5-a Jaro. N-o 245 APERAS SEMAJNE 13. Junio 1929



ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

REDAKTEJO: 14, avenue de Corbéra, Paris-12e
Gvidanto: E. Lanti

SIDEJO de Plenum-Komitato de SAT
23, rue Boyer, Paris-20e

ADMINISTREJO: Colmstr. 1, Leipzig O 27
Administranto: R. Lerchner

LA BRITA MINISTO KAJ LIA MONDO

EKZEMPLO KLASIKA DE LABORISTA EKSPLUATIĜO

Same kiel en la tempo, kiam vivis Karl Marks kaj Fr. Engels, kiuj observis la vivstaton en tiu lando de plej frua kapitalismo kaj priskribis ĝin, la unua en "Kapitalo", la alia en "Vivo de laboristoj en Britio" en jaro 1844 — hodiaŭ ankoraŭ neŝanĝite regas la mizero inter granda parto de la brita laboristaro. Precipe la ministaro suferas sekve de senlaboreco aŭ duonsemajna laboro. La aŭtoro de l' sekvanta priskribo donis al la tradukinto specialan permeson utiligi la verkaĵon en 'S-ulo'. Kvankam ne sensacia pro noveco de l' okazoj, ĝi estas aktuala, ĉar ĝi estas sur la fundo de nia laborista problemo: kapitalisma sociordo kaj porsocialisma batalo. — Red.

Preskaŭ dum mia tuta vivo mi troviĝis en minista distrikto. Kiam mi fariĝis instruistino, la plimulto el miaj lerninfanoj estis ministidoj. Antaŭ dudek jaroj regis notinda manko da sklavema sento inter tiuj homoj. Mi gardas memorojn pri beletaj kabanoj, kie miaj konatoj vivis — brile puraj spite ega batalo kontraŭ fumo kaj malpuro. Multaj prizorgis kanariojn aŭ kurhundojn. Ofte mi aŭdis ministon prediki en kapelo multe pli elokvente ol multaj profesiaj pastroj, al kiuj mi poste aŭskultis.


Multaj apartenis al lokaj ĥoroj kaj povis kanti laŭdezire preskaŭ ĉiun oratorion. La plimulto el la muzikaĵoj estis religi-tema. Ili aspektis fieraj homoj, fieraj pro siaj nigraj vizaĝoj. —

Manko de ĉia komforto

Lastan semajnon mi promenis laŭlonge de aro da ministaj stratoj: estis nigre ekstere, sed la domo-ŝtupoj estis blankaj kaj blankaj kurtenoj kovris la fenestrojn. Sed mi rimarkis mankon da floroj, kiuj troviĝis ĉe ĉiuj fenestroj dum mia juneco. Mi demandis unu, kiel fartas la kanarioj (li dresis ilin).

Iam, ĉe tiuj gastemaj homoj, la vizaĝoj radiis pro ĝojo renkonti min, kaj oni diris: "Envenu, trinku teon". Sed hodiaŭ tiu homo staris ĉe la pordo tenata de la mano, kaj li ne lasis min enveni. Li diris, ke li vendis la birdojn dum 1926 pro laborĉesigo kaj mi hazarde eltrovis, ke ili ne estis la solaj venditaĵoj. Alian viron mi demandis pri liaj hundoj. "Mi ĵetis tri el ili en lageton kun ŝtono ĉirkaŭ la koloj, dum la lokaŭto", li diris sentone.

La vivo ne estis bela eĉ antaŭ dudek jaroj: la minist-edzino kovris la kapkusenojn per nigra atlaso, ĉar estis tute neeble uzi blankajn ŝtofojn, kiuj tuj griziĝis. La edzo devis eklabori je l' 4-a horo mateno, kio signifis, ke ŝi devis ellitiĝi je la 3-a por prepari la fajron kaj la matenmanĝon. La infanoj devis manĝi antaŭ ol iri al la lernejo je la 9-a kaj revenis je la 12-a, malsataj kaj malpuraj. Post la laboro la viro havis neniun apartan banoĉambron kaj devis lavi sin en bankuvo, dum la edzino lin frotis. Mi vidis virinon forĵeti la lav-akvon; ĝi estis nigra kiel inko, kun 5-centimetra tavolo da karbopolvo.


J.F.H.

Vivkutimoj — Tradiciemo

Dum la lastaj 30 jaroj la viroj per organizado penis plibonigi la kondiĉojn, sed eĉ nun malmulte da minejoj havas modernajn necesejojn. Sed por la virinoj malgraŭ organizado, estas preskaŭ neeble ion pli bonan atingi. Nenio krom longa distanco (per aŭto) for de l' fumanta, nigra karbejo povos helpi ilin. Infannasko estas rigardata kiel natura afero: dum unu, du tagoj la virinoj ripozas en lito kaj sentas sin kiel "sinjorinoj". Sed plej ofte la virino laboras jam la postnaskan tagon. Morto ankaŭ estas terura: la kadavro devas resti en la sola dormoĉambro ĝis la entombigo. Morto estas respektata ĉe tiuj homoj — ili komencas pagi mort-asekursumon de l'infana naskiĝo, por esti certaj havi laŭmodan enterigon. Ili preferus malsati ol ne pagi tiun sumon. Sed eĉ ĉi tio devis ĉesi. Kaj ĉesi esti mort-asekurata signifas tiom, kiom monprunto kontraŭ edziĝoringo.

La labor-infero

Eĉ dum bonaj tempoj la viroj laboris longajn horojn je mizeraj kondiĉoj: Multaj laborejoj memorigas pri mezepokaj torturejoj. Grandparte la homoj laboras preskaŭ nudaj. Multaj rampas sur la kvar membroj kun ĉeno ĉirkaŭ la talio tirante ĉaretojn. Multe da homoj ne kredas, ke tiuj ĉi ĉenoj estas uzataj; sed tiu ĉi nekredo ne povas forigi la fakton. Liaj pantalonetoj kaj ŝtrumpoj tremiĝas en ŝvito kaj ofte, dum li atendas sian vicon eliri la ŝakton, li malvarmumas.

En tiuj tagoj, kiam li bone nutriĝis, li povis facile forĵeti iun malvarmumon. Sed hodiaŭ, kiam li iras al laboro post eta manĝo de pano kaj margarino, kaj teo sen lakto, li atingas staton de malforto post 4—5 jaroj da nesufiĉa nutrado; la ŝvitado estas troa, tiel ke li devas paŭzi 3—4 foje ĉiuhore por ĉirkaŭtordi la pantalonetojn kaj malplenigi la botojn de fluidaĵo. Malmulte nun posedas duonŝtrumpojn.

Multaj lernantoj suferas pro malsanoj kaŭze de malpureco, kaj la san-kontrolisto (angle: Medical Officer of Health) notas por la provinco Jorkŝir en sia ra-

porto 1927 kreskon je malsanoj kaj diras, ke ĝi troviĝas ĉe la infanoj normalaj kaj devenas ĉefe el mankoj de suno kaj nutraĵo.

Mi supozas, ke multaj jam aŭdis pri la blindeco ĉe la karbo-ĉevaletoj. Sed kiom da personoj ekster la karbregiono aŭdis iam pri la minista konvulsia malsano de l' okuloj nomata nistagmio, kiu kaŭzas duon-blindecon, aŭ pri konvulsioj ĉe la pulmoj, ia speco de astmo? En tiuj pulmoj gratataj pro penetrantaj karberoj kaj polvo prepariĝas grundo por tuberkulozo.

La salajroj akuzas

La salajroj varias laŭ distriktoj. En Durhamo la minimumo estas 7,1 ŝilingoj tage (ĉ. 1,8 dol.) ĉe 7½-hora labortago por la karbohakisto; en aliaj fakoj oni ricevas 6,5 ŝil. (1,6 dol.) por 8-hora laboro. En Northömberlando la minimumo estas 6,8 ŝil. (1,7 dol.) tage. Multaj laboras nur 4 tagojn semajne kaj troviĝas tial de financa vidpunkto en pli malbona pozicio ol se ili estus tute senlaboraj, ĉar tiam ili eble ricevus senlaborulan subvencion, kiun ili povas ricevi laborante nur 3 tagojn, sed ne 4 tagojn semajne. Multaj preferas tiun laboron ol peni akiri la subvencion. La meza semajna salajro por laboristo estis dum junio 1928 en Durhamo 2 £ 4 ŝ. (= ĉ. 11 dol.), en Northömberlando 2 £ (= 10 dol.).

En la lasta distrikto ekzistas ja tragedia flanko. Postmilite, la karbokompanioj tie konstruigis belajn domojn, kiujn la laboristoj povus finfine elaĉeti per posemajnaj pagoj. Dum prospera tempo tiu de pago (po semajno 10 ŝil.) de la salajro estis bonega ideo. Ĝi signifis por la ministo hejmon okaze de lia maljuneco kaj ke liaj idoj ne bezonus lupagi por domo. Li nun ne povas forlasi ĉi tiun domon, kaj samtempe li ne rajtas pretendi iun ajn subtenon pro malriĉeco. Dum senlaboreco li ŝuldas al ĉiu, al la domposedanto, al la butikisto, al ĉiu. Sed de la momento, kiam li taglaboras, aperas vico da kreditoroj, kiuj ekfrapas je lia pordo. Ekzistas en Kimrio multaj distriktoj kun 10 mil loĝantoj, ĉiuj senlaboraj, vivantaj per meznombre 30 ŝil. (ĉ. 7,5 dol.) semajne por la tuta familio, kiu lasta ĉe ministoj ja estas grandega. (Finota.)

L e o n o r a E y l e s.
Trad. laŭ revuo "19. jarcento" (jan. 1929) I. Floro.

LA INTERNA STATO DE BULGARIO

Jen la karakteraj trajtoj de la interna stato en nia lando: La parta stabiliĝo de l' kapitalismo komencis ruiniĝi. La restarigita i n d u s t r i o ne povas trovi vendejojn por siaj varoj, ĉar la stabiliĝo malgrandigis la konsumkapablon de l' laborulaj amasoj ĝis minimumo. Tio sekvigas nepran kaj akran industrikrizon.

La m e t i p r o d u k t a d o apenaŭ marŝas antaŭen. La metiistoj estas ŝarĝitaj per neelporteblaj tributoj. Ilin konkuras ankaŭ la moderna kapitalista produktado. Ruiniĝo de l' metiistoj konstante pligrandiĝas.

La a g r i k u l t u r o same krizas. Anstataŭ pligrandiĝi, la produktado plimalgrandiĝas. La faŝista registaro helpas nur la riĉajn bienposedantojn. Ĉiuj kreditoj de la Agrikultura Banko eniras iliajn manojn.

La l a b o r i s t a k l a s o estas submetita al nekonita ĝis nun ekspluatado. La kapitalisma "raciigo" malgrandigis la salajrojn ĝis minimumo, pligrandigis la labortagon je 10, 12, 15 horoj. Plimalboniĝis la laborkondiĉoj. La teruraj akcidentoj, kiuj kaŭzis la morton de dekoj da gelaboristoj, la amasa formortado de la blankaj sklavinoj en la teksfabrikoj plej bone karakterizas la teruran staton de la laborista klaso.

La s t a t o d e ŝ t a t a j d u n g i t o j estas same tre mizera. La salajroj tro malaltaj, la ofica stabileco neniigita, la rajtoj forrabitaj.

La ŝ t a t o plene bankrotis finance. La buĝetdeficitoj ĉiujare pligrandiĝas. Per la lastaj pruntoj "stabiligaj" ĝi definitive fariĝis ekonomia kolonio de la grandaj imperialismaj ŝtatoj, kiuj solaj komencis aranĝadi la buĝetojn en Bulgario, konforme siajn celojn.

L a k l a s a j k o n t r a ŭ e c o j estiĝis pli akraj kaj profundaj. La laboristamasoj pli kaj pli sin orientadas maldekstren. Dum la lastaj kruelaj jaroj konturiĝis tre klare la frontoj de la du batalantaj klasoj ĉi tie. Unuflanke — la burĝaro, la faŝismo, la etburĝoj demokratemaj, la faŝistiĝintaj gvidintoj de ĉiuj etburĝaj partioj kaj amasaj senpartiaj organizoj. Aliflanke — la laborista klaso, la malriĉa, en mizero dronanta vilaĝana amasego, la laborula metiistaro, la amaso da elmigrintoj, ĉiuj subprematoj kaj ekspluatatoj, unuigitaj en la B l o k o d e L a b o r o. La gvidantan rolon ludas la laborista klaso.

Ĉe tia stato por la financa kapitalo ne restas alia rimedo por konservi sian faŝistan regpotencon, ol la progresanta likvido de la lastaj restoj de l' burĝa "demokratio" kaj vasta apliko de l' k r u d a t e r o r o kaj m a l k a ŝ a d i k t a t o r e c o. Ĉi tiu kapitalo jam preparas siajn fortojn por deklari per nova militistfaŝista repreno de l' regpotenco la malkaŝan diktatorecon. Nur la timo je la amasoj igas heziti iujn ideologojn de l' kapitalismo pri la starigo de diktatoreco malkaŝa, kiel en Jugoslavio. La financa ministro en publika kunveno esprimis tion: "Deklari diktatorecon, sed ... ĝi sekvigos revolucion!" Pri tio tamen ekzistas ankaŭ alia opinio: ke per kruda teroro oni sukcesos malfortigi la laborulajn amasojn. Tiu diferenco en la opinioj kaŭzis grandan krizon ĉe la reganta "demokratia konkordo".

Sed dum en la vicoj de l' burĝaro la procedo de disfalo enradikiĝas pli kaj pli, ni rimarkas ĉe la laboruloj decidan antaŭeniron kaj aktiviĝon. La oportunistaj tendencoj malaperas kaj la laborista movado iras la vojon de nepacigebla klasbatalo. Por ĉiuj laboruloj estas klare, ke nur laborist-vilaĝana registaro povas anstataŭi la faŝistan diktatorecon.

Laŭ "Laborista Afero" kompilis: Diablido-Satano.



PRI NEDERLANDO

Same kiel en n-oj 242 kaj 244, ni aperigas en subaj linioj refuton kaj korekton al la artikolo de K-do I. F. en n-o 239 aperinta sub la supra titolo. Ĉi foje temas speciale pri la lernejaj aferoj en Nederlando. — Red.

En la artikolo de K-do I. F. troviĝis kelkaj malĝustaĵoj; sed nur tiujn pri la edukado mi volas ĝustigi. K-do I. F. skribis: "La infanoj vizitas ĝis la 16-a jaro la lernejon, lernas francan kaj germanan lingvojn de 12-a ĝis 14-a jaroj kaj anglan de 14-a ĝis 16-a. "Sensencaĵo! Laŭ lerndeviga leĝo, ekfunkciinta je 1. januaro 1929, la infanoj devas minimume dum 7 jaroj viziti la lernejon. Sekve, ordinare komencinte la lernadon en 5½-a aŭ 6-a vivjaro, ili povas forlasi la lernejon estante 12½- aŭ 13-jaraj. Neinteligentuloj, nesukcesintaj trastudi la 7 klasojn dum 7 jaroj, devas viziti la lernejon, ĝis ili havas 14 jarojn. Estante 14-jaraj, la infanoj eklaboras en fabrikoj, mastrumadoj, ĉe metiistoj ktp. Nur malplimulto, plejparte idoj de pli bone pagkapablaj homoj, poste vizitas mezgradan lernejon kaj t i e komencas lerni francan kaj poste ankaŭ germanan kaj anglan lingvojn. En la unuagradaj lernejoj instruo pri fremdaj lingvoj nuntempe ne estas leĝe permesita. Se oni volus instrui esperanton dum instru-horoj, antaŭe devus esti ŝanĝitaj la instruleĝoj.

En la orienta parto de Nederlando, kie regas por la laboristaro mizeraj cirkonstancoj, la infanoj multfoje forestas el la lernejo por helpi al la gepatroj akiri vivrimedojn. Kvankam pro la arbitra foresto la gepatroj devus esti punataj (monpuno aŭ malliberejo), la lernejestroj ne ĉiam mencias la "laŭplaĉajn" forestojn al la inspektoro, ĉar ili timas perdi lernantojn, profite al la ekleziaj lernejoj, kiuj tute ne severe atentas, ĉu la lernantaro regule venas. Estas ja "devo" de l' ekleziaj lernejoj ne tro ege klerigi la infanojn kaj eĉ stultigi ilin per religia instruo.

Tion mi diras, por pruvi, ke la edukado ne estas tiel bona, kiel asertis K-do I. F. Pri la aliaj malĝustaĵoj dume jam skribis du aliaj K-doj en "S-ulo".

E d u k i s t i n o (10287).

Fundamento de Esperanto (kvinlingva) Pr. 1,— mk.g.
Fundamenta Krestomatio, 460 pĝ. Prezo: 2,50 mk. g.
KABE, Vortaro de Esperanto 175 pĝ. Pr.: 2,20 mk.g.
Lingvaj Respondoj de d-ro Zamenhof. 92 pĝ. Prezo: 1,— mk. g.

La kvar klasikaj verkoj, sur kiuj baziĝas nia tuta lingvo-uzo, kiuj estas konsililoj kaj helpiloj por ĉiu esperantisto.

Haveblaj ĉe la Administracio de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germanio).

LA FIASKO DE KOLONIO

De tempo al tempo aperis en "S-ulo" raportoj pri tiu aŭ alia "kolonio" — komunumo el K-doj dezirantaj vivi kolektive ekster la kadro de l' moderna kapitalismo. Ankaŭ kelkfoje presiĝis proponoj de idealistoj, riskemaj SAT-anoj, kiuj esperis povi vivigi laŭ similaj modeloj SAT-kolonion. Nu, al kiaj rezultoj kondukas tiaj kolonioj, kiuj originas el la deziro de siaj fondantoj izoliĝi el la nuntempa homa socio, forkuri la kapitalisman sistemon, anstataŭ ĝin fronte ataki, — por tio hodiaŭ nur unu ekzemplon!

Temas pri la kolonio "La Kaverno di Zaratustra". La nomo estas ida, ĉar ĝia fondinto estas (aŭ almenaŭ estis) — idisto. Siajn unuajn vivjarojn tiu kolonio pasigis en mizeraj kondiĉoj kaj en ekstrema primitiveco ne malproksime de Düsseldorf (Germanio). Post kompleta fiasko tiea pro internaj malpacoj la entreprenema s-ro "Filareto Kavernido" (la pseŭdonimo de l' fondinto) translokigis la entreprenon al Aĵaksio (Ajaccio) en insulo Korsiko. Tri monatojn post la instalo ŝajne ĉio bone iris. Sed — ne sen la helpo de l' kapitalismo! Kelkiuj el la kolonianoj trovis laboron en la urbo ĉe kapitalistaj entreprenoj kaj akiris sufiĉe da mono por permesi al kvar personoj kulturi la teron. Tiel ili produktis siajn legomojn, lakton, fromaĝon ktp.

Sed post nelonge oni komencis interdisputi. La dunglaboristoj en la urbo riproĉis al la aliaj havi pli agrablan kaj malpli lacigan vivon. Post kvarsemajna disputado oni eltrovis, ke la deveno de ĉio malbona estas la "marĉa febro", pro la malsaniga regiono atakanta la plimulton nekutiman je tia klimato. Kompreneble oni devis iel klarigi la malbonan funkciadon kaj komenciĝantan disfalon . . .


Vidante la fatalon, la fondinto decidiĝis nuligi la kontrakton pri la grundo por serĉi pli favoran lokon. Sed ne atendante iajn decidojn, preskaŭ ĉiuj kolonianoj foriris, anoncante sian forveturon nur unu tagon antaŭe kaj prenante kun si la lastan salajron, kiu devus esti liverata en la komunan kason (ĉar iliaj 11 infanoj estis nutrataj kaj prizorgataj dum la tuta tempo de la komunumo). Sep infanoj, kiuj depost sep jaroj estis edukataj en la komunumo, foriris kun la patro, kiu eĉ ne kvaronon de la kostoj elspezitaj por ili estis paginta. Fine la fondinto estis arestata sekve de plendo ĉe tribunalo fare de unu virino, komunuma membro, kiu volis rehavi sian propraĵon. Li vivis 6 monatojn en malliberejo kaj estas nun devigata forlasi korsikan teritorion pro instruado kaj praktikado de nudismo, abortigo kaj atakoj al la sekshontemo.

Tamen, post tiu fiasko li ne ŝajnas ema cedi siajn planojn, sed provos enŝipiĝi al Haiti, por tie denove ekprovi sian ludon. Ni deziru al li "bonan vojon", sed niaj K-doj, kiuj emas realigi same fantaziajn projektojn, instruiĝu el tiu ekzemplo kaj ne komencu konstrui laŭ revaj ideoj, ignorante la faktorojn de l' reala vivo, nian nuntempan socion, ĝian ekonomian kondiĉaron, ĝian klasan batalon. N. B.

FRANCA SUDANO

Ni aperigas ĉi sube kaj en la sekvantaj n-oj interesan skizon pri Okcidenta Afriko, pri tiu parto, kiu limas al la dezerto Saharo. Ni ricevis la artikolon de SAT-K-do, kiu vivis kaj laboris en tiu regiono dum du jaroj kaj nun komunikas siajn impresojn, ne en formo de persona rakonto, sed kiel instruplenan priskribon al niaj legantoj. — Red.

Franca Sudano estas la plej vasta el la ok kolonioj, kiuj konsistigas Francan Okcidentan Afrikon. Sur du trionoj de tiu ĉi kolonio etendiĝas parto de la dezerto Saharo. La alian trionon trafluas la riveroj Senegalo kaj Nigero kun siaj alfluantoj. La lando trafluata de Nigero estas la plej vasta kaj fruktodona.



La varmego estas la ĉefa trajto de la sudana klimato. La meza temperaturo estas ĉ. 24 gradoj en januaro, 42 en majo — la plej varma monato en tiu ĉi regiono — kaj 38 en aŭgusto. Kelkfoje la termometro atingas 48 gradojn. Ŝtonoj subsune estas tiom varmaj, ke ne estas eble kapti ilin per la mano.

En la varmaj landoj pli ol alie la vegetaĵoj, bestoj kaj homoj bezonegas akvon. Tial la vivo tie koncentriĝas precipe ĉe la riverbordoj. Sufiĉas trarigardi karton de Sudano por konstati, ke vilaĝoj kaj urboj ĝenerale kuŝas ĉe riveroj: Kaj[1] ĉe Senegalo; Bamako, Kulikoro[1], Segu[1], Mopti, Tombuktu[1] k. a. ĉe Nigero.

La kapricoj de la klimato

De mezo de junio ĝis mezo de oktobro, t. e. dumsomere okazas fortaj uraganoj, kiuj estas propraj al la tropikaj landoj. Pluvo falas torente. Riveroj leviĝas kaj en iuj lokoj superakvas pli malpli vastajn terspacojn. Apud Mopti, post la kunfluejo de Nigero kaj ĝin alfluanta Bani, la larĝo de la fluejo atingas preskaŭ 120 kilometrojn. Vilaĝoj sur altoj fariĝas insuletoj.

La alia parto de l' jaro estas nomata seka sezono. Tiam la riveroj malleviĝas, lasante sur la grundo ŝlimon anstataŭanta la plej bonajn sterkojn. Indiĝenoj per primitivaj instrumentoj rapidas plugi, kulturi kaj semi.

Rimarkinde fruktodona estas la vasta regiono, nomata Masina, kiu ebenaĵe disentendiĝas inter Segu kaj Tombuktu. Tie Nigero ŝveligita de Bani, dividiĝas laŭ aro da interplektiĝintaj fluejoj, kiuj oportune permesas facilan akvumadon super la kampoj. En iu regiono, norde de Nigero, en Saharo estas lagoj kaj lagetoj, kiujn plenigas Nigera akvaro dum leviĝo. Dum la seka sezono ili estas tre oportunaj akvujoj.

La klimato estas akra por la eŭropanoj, kiuj ne povas plenumi pezajn, tro lacigajn laborojn, pro la troa varmo, kiu rapide anemias[2] kaj plimalfortigas ilin. Oni povas diri, ke eŭropan(in)o alveninte Sudanon perdas ĉirkaŭe duonon de sia forto. Ekzemple virino ne povas plenumi la plej lacigajn mastrumlaborojn — manĝkuiradon, lesivadon, gladadon k. a. Ŝi bezonas negran servist(in)on. Post dujara restado necesas, ke koloniano revenu en bonklimatan landon por ripozi kaj resaniĝi. Cetere post tiu minimuma tempo preskaŭ ĉiuj privataj kaj ŝtataj entreprenoj donas pagatan libertempon al siaj oficistoj.

La pluvema sezono estas la plej malsaniga. La senmova akvaro en la kavaĵoj kaj la varma malsekego, kiu saturas la atmosferon, tute konvenas por la multegiĝo de kuloj kaj mikroboj, teruraj

[1] France: Kayes, Koulikoro, Segou, Tombouctou.
[2] Sensangigas.

Ĵus aperis:
KANDID
la ĉefverko de
VOLTER
en esperanta traduko de
E. Lanti
kun antaŭparolo de la
tradukinto kaj ilustroj de
R. Bartelmes
160 paĝoj. Prezo: 1,70 mk. g.

malamikoj pro la diversaj malsanoj, kiujn ili povas inokuli: malarion, flavan febron, dengon[1] k. a.

Malgraŭ tiu klimato, la tiea vivo ne estas tro malmildega por la eŭropanoj. Male, ĝenerale ili dank' al la altaj salajroj — preskaŭ duoblaj je tiuj pagataj en Francio — vivas pli larĝe, pli komforte ol en Francio, kie ili apenaŭ sufiĉe laborakirus por vivi. Certe oni suferas pro l' varmo, sed oni iagrade kutimiĝas, kaj oni povas malpliigi la riskojn malsaniĝi observante la ĉefajn higienajn principojn. Oni devas precipe esti sobra, eviti laŭeble tro lacigajn laborojn, ŝirmi sin kontraŭ kulpikoj kaj ĉiutage ne forgesi gluti receptitan kvanton da kinino — 25 aŭ 50 centigramojn laŭregione kaj laŭsezone — antaŭforiga kuracilo kontraŭ malario.

Pri diversaj indiĝenaj gentoj

En la sahara Sudano vivas nomade Maŭroj kaj Tuaregoj, ambaŭ el blanka raso. Ili havas fieran karakteron kaj ŝategas sendependecon. Ĝis nun la franca kapitalismo ne sukcesis subigi ilin, kiel la negrojn, kaj eĉ por eviti ribelojn kaj konservi pacon, oni pensiumas kaj ordenumas la plej influajn ĉefojn. Antaŭ la franca koloniigado Maŭroj kaj ĉefe Tuaregoj ofte ekatakis kaj elrabis la Saharajn karavanojn kaj la loĝantaron ĉe Senegalo kaj Nigero, kiu estas nur el negra raso.

Inter diversaj negraj gentoj la Tukuloroj[1] meritas esti aparte nomataj. Ili ja ne estas puraj negroj, sed idoj iam kunmiksitaj negroj kaj blankuloj. Tamen en ili la ecoj de la negra raso superas. Antaŭ la franca okupado ili feŭde, despote regis super aliaj negraj gentoj. Komandite de la fama ĉefo Samori ili vane defendis la landon kontraŭ la franca armeo, kiu dank' al sia moderna armilaro facile venkis kaj kaptis Samori-n. La venkintoj mortpafis lin kaj kruelege turmentis kaj murdis multe da venkitoj, eĉ infanojn kaj virinojn.



Vilaĝo de Tukuloroj kun moskeo

La pligranda parto el la indiĝenoj, kiuj vivis en la malpaca, ĥaosa epoko, kiam Tuaregoj kaj Tukuloroj rabadis kaj subpremadis ilin, jam ne estas forgesintaj tiun pasinton kaj pro tio ĝenerale estas kontentaj pri siaj novaj mastroj, kiuj donis al ili pacon kaj relativan trankvilon. (Daŭrigota.) (13706)

[1] Tropika epidemia malsano, simila al gripo.

[1] France: Toucouleurs.

KUN TIU ĈI NUMERO ESTAS EKSPEDATA "LA LERNANTO"

Nova Politika Revuo

Beogrado, 23. aprilo 1929. Aperis la unua n-o de dumonata organo "VENKO", "organo de monarĥista ideo". En gvidartikolo de l' 1-a n-o troviĝas jenaj linioj:

"Nia programo, nenebulita per nedifinitaj devizoj, kreitaj de partiaj organizoj por pli facile trompadi naciajn amasojn, estas formulebla per malmultaj vortoj kompreneblaj eĉ al la infanoj — servado al monarĥista ideo.

"Ŝajnas al ni, ke nur tiam, kiam la homaro komprenos la tutan mensogon de tiuj politikaj doktrinoj, kiujn de la tempo de malĝojmemora t. n. granda franca revolucio propagandas krimulaj elementoj plenumantaj tiamaniere siajn personajn aferojn, — tiam kaj nur tiam ekestos sur la tero libereco, egaleco kaj frateco.

"Samtiel profunde ni estas konvinkitaj, ke vera libereco, vera egaleco kaj sincera frateco povas veni ne pere de hazardaj elementoj kiaj ekz. estas prezidantoj, parlamentoj, elektitaj ministroj, sed nur pere de la volo de heredanta reganto, naskita por tiu alta misio. Neniam bonfarto de grandaj nacioj venis de deklaracioj de elektitaj reprezentantoj, neniam nacio fariĝis granda kaj potenca, se ĝi ne estis regata de monarĥo, kiun Dio sendis.

"Klera absolutismo — ideala kreitaĵo de ŝtata ordo. Absoluta monarĥio — sendito de Dio. Monarĥio — religio. Por rideto de Napoleono liaj spertaj grenadistoj ĵetis sin sub la radojn de kanonoj, por ke ili ne restu en la koto kaj por ke ili ĝustatempe atingu al la pozicio. Malfacile estas eĉ ekpensi, ke por laŭdesprimo de la parlamento estus ebla tia sinoferado. Malfacile estas eĉ pensi, ke la respublikanaj armeoj scias pri hero-

La anglaj elektoj kaj la virinoj

> Aliris la familiestroj k ekparolis antaŭ Moseo: La Eternulo ordonis disdoni la teron kiel posedaĵon per loto al la Izraelidoj k . . . doni la parton de nia frato Celofĥad al liaj filinoj . . . Ilia posedaĵo estos forprenita el la posedaĵo de niaj patroj k aliĝos al la posedaĵo de tiu tribo, al kiu ili ekapartenos . . . Tiam Moseo donis ordonon al la Izraelidoj laŭ la instrukcio de la Eternulo, dirante: Prave parolas la tribo de la Jozefidoj . . . "
>
> Mozeo, IV. libro, (Nombroj), ĉap. XXXVI.

Ĵus pasis la elektoj en Anglio kaj sekve de l' nova jura situacio estis proks. 3 milionoj pli da voĉdonrajtaj virinoj ol viroj. Se ni rerigardas al la evoluo en la jura stato de l' virinoj, ni povas kompari ĝin kun lanugo, kiun depost ĉesigo de la patrinrega sistemo la vento petole jen supren-, jen malsupren-ĵetis, ĉiam konforme je la interesoj de l' posedantaro.

Se ni esploras la kaŭzojn, per kiuj rezultis la fina pliboniĝo en la jura situacio de la virinoj, tiam ni sendube povas konstati, ke la pliboniĝoj okazis neniam por la intereso de l' virinoj kaj neniam pro iuj konsideroj je la virinoj, sed parte pro iuj personoj, kiuj ĉiam estis viroj, kaj precipe pro ekonomiaj interesoj. Por ĉi lastaj interesoj oni iam nuligis la patrinrajton[1]. El la esenco de l' supra biblia ĉapitro tio klare videbliĝas. En tiu tempo la virino krom vestaĵo kaj juveloj neniun valoron povis posedi, ĉar se ŝi estus heredinta sian bienon kune kun sia persono, tiu bieno fariĝus propraĵo de tiu, kiu ŝin aĉetis. (Vidu en supre citita ĉapitro de la biblio.)

Tamen en tiu tempo ankaŭ heredis la virino, se ŝia patro ne havis filon, por ke per ŝi estu konservata la nomo de ŝia patro[1]. Se ni komparas la Mosean juran staton kun la jura stato donita al virinoj de la angla registaro, ni povas konstati, ke ambaŭ la samon celas: savi la malfortulinon por la intereso de la bieno. En la batalo por defendi la privatposedon la ĉiutempa leĝdonado devis konsenti pli kaj pli da rajtoj al la virino. La leĝfaranto estis la viro, kiu uzis la virinon kiel ilon en tiu batalo. La devizo: per ili, sed ne por ili — estis kaj restos, ĝis la virinoj ekkonos sian destinon laŭ sia natura kondiĉaro kaj ĉesigos tiun ludon per decidaj vortoj.

Ĉi tiu tempo proksimiĝas! Vane diris Ŭinst'n Ĉorĉil (angle: Winston Churchill) en 1928[1]: "Ni ne devas ektimi! Se ni laŭ hazardo prenas milon da virinoj kaj milon da viroj, estas certe, ke inter la virina milo troviĝos pli da konservativaj voĉoj ol inter la viroj. Mi ne kredas, ke ĉu la socialismo, ĉu la komunismo, ĉu ia ajn alia ribela propagando povus trovi vojon inter tia balotrajta publiko, kies pli grandan parton tiu penso okupas, kiel oni povus

[1] La aristokrataro post la j. 1514 (hungara kamparana revolucio) intencis malhelpi geedziĝon inter kamparanoj k nobelinoj pro kompreneblaj kaŭzoj. Leĝo de j. 1516 (VII. dekreto, 62. titolo) tiel disponis, ke "la reĝo donacu la bienojn de mortintaj nobeloj al liaj filinoj, se tiuj ne estas, al la vidvinoj. Sed se ili volas edziniĝi kun kamparano, la reĝo donacu la bienon al iu ajn (§§ 1—3). La § 4 nuligis la rajton donitan al la virinoj en 1437 k 1490, laŭ kiu, se nobelino edziniĝis kun senbiena kamparano, ŝi ricevis sian filin-kvaronon "en naturo", t. e. grundon.

[1] En "Pesti Naplo", 31. 7. 28, aperis artikolo sub titolo: "Ekkomenciĝis milito de la seksoj en Anglio", verkita de Harold Böĉer (angle: Butcher). Mi elĉerpis la intervjuon.

aĵoj, kiajn en la lasta milito faris en la vicoj de caraj kaj reĝaj regimentoj de Serbujo, Germanujo kaj Rusujo la soldatoj, kiam ili per nudaj manoj disŝiradis en la nomo de siaj monarĥoj kaj patrujo la pikantan draton antaŭ la malamikaj pozicioj.“

T i e u l o.



Pli science ol la scienculoj

En “S-ulo“ 236[1] aperis artikolo “Malsano de vitro kaj ĝiaj sekvoj“. Mi tralegis la artikolon mirigite, ĉagrenite. Kial oficiala organo de SAT malŝparas valoran spacon por sensencaĵo? Laboristoj ne havas “kolektojn de malsanaj vitraĵoj“. Ho! Ĉio estas malkaŝata nun! La redaktoro (pro mon-donaco, sendube) per presigo de senpaga anonco helpas la “inventiston“ disvendadi sian burĝan “inventon“.

Mi tralegis la artikolon denove. Eble mi ne tute komprenis ĝin. Ne konvenas, ke oni havante SAT-anecon de duono da jaro malfidu nian honorindan redaktoron kaj malnovan SAT-anon. Mi cerbumadis, ĝis mia kapo ekdoloris. Iom post iom mi konstatis mian senpripensecon. Mi kulpigis vin senkaŭze. Pardonu, K-do redaktoro. Pardonu, K-do Ploss. Vi malfermis miajn okulojn. Vi ebligis min vizii laboriston, kiu revenas hejmen el fabriko. Alproksimiĝante sian hejmon li ekaŭdas kortuŝajn vekriojn. Rapidpaŝe li enkuras la domon kaj demandas sian plorantan edzinon: “Virino, kio okazis? Ĉu infano mortis?“ “Pli malbone ol tio“, ŝi respondas, dum larmegoj banas ŝian vizaĝon. “Ĉu du? tri? ses infanoj mortis? Parolu, virino!“ “Eĉ pli malbone ol tio. La pokalo malvarmumis.“ La edzo paliĝas. “Mia heredita Pokalo! Malbenita filino de hibrida hundaĉo! Nur dek infanojn por vesti kaj manĝigi, sed tamen mankis al vi tempo por gardi la pokalon. Telefonu al kuracisto, dum mi trinkigos al la pokalo varmegan vinon.“

Ja, Gek-doj, estas bonega eltrovo, sed mi havas pli bonan. Mi donacas, ne vendas mian. Salo! Ordinara salo, kiun oni manĝas kun terpomoj kaj ovoj. Ĝi konservas viandojn kaj fiŝojn, kial ne vitraĵojn?

Muŝoj malbonigas niajn meblaron kaj manĝaĵon, malpurigas niajn fenestrovitraĵojn kaj spegulojn. Faru jene.

Pulvorigu salon. Metu malgrandan kvanton en la pokalojn, glasojn aŭ aliajn vitraĵojn. Solvu venenon en pelvo plena da akvo. La muŝoj manĝos la salon, erare pensante, ke ĝi estas sukero kaj soifos. Poste ili trinkos la venenan akvon kaj mortos. Kiel oni diras angle: “Ni mortigos du birdojn per unu ŝtono.“

Lasu nin rigardi la estonton. La uzado de salo kaj veneno pligrandiĝos. La sal- kaj venen-komercistoj pliriĉiĝos kaj pligrandigos la salajrojn de siaj laboristoj. Tiuj laboristoj aĉetos aŭtomobilojn, motorboatojn ktp. La fabrikistoj de aŭtomobiloj, motorboatoj ktp. pliriĉiĝos kaj pligrandigos la salajrojn de siaj laboristoj. Tiuj laboristoj aĉetos diamantojn, juvelojn ktp. La komercistoj de diamantoj, juveloj ktp. pliriĉiĝos kaj . . . oni povas daŭrigi senfine.

Ĉu ne estas videble, ke mia rimarkinda eltrovo savos la homaron el mizero? Mi rajtigas ĉiun utiligi ĝin senpage. Mi nur petas, ke la vitro-amantoj konstruu mian monumenton el vitro kaj konservu ĝin per salo.

B e n O d i n o v (13 268), Nov-Jorko.

[1] Tiu artikolo troviĝis en la “Scienc-Kultura Paĝo“, kiu estas redaktita de K-do D. S n e ĵ k o, Minsk.

El kvindekjara vivo en sovaĝejo

(Fino. Vidu antaŭan n-on)

La revo pri l' oro disfluas

Morgaŭan matenon frue, Petro — nia nova amiko — vekis nin, kaj frotante niajn okulojn ni vidis la leviĝantan sunon ĉe la orienta horizonto, ni aŭdis la sonon de la kakatuoj inter la foliaĵo de la arboj. La fajro jam ekbrulis, kaj la akvo estis varmega, kiam ni iris al la rivero por nin lavi. Fininte la matenmanĝon, ni rulis la lankovrilojn kaj, kun Petro, ekiris. Ni piediris laŭ polvokovrita vojo, sub la bruligaj radioj de la Aŭstralia suno. Petro interesis nin per siaj rakontoj pri aventuroj kiel orministo antaŭjare. Sed kiam li sciiĝis, ke ni esperas trovi laboron ĉe la “Viktoria-Orkampoj“, li informis nin, ke la tempo por malriĉulo labori kiel orministo forpasis antaŭ longe; ke nuntempe jam riĉuloj, per meĥanikaj procedoj, kapablas elĉerpi la oron. Sekve, kiam ni preterpasis Sandhörst kaj Kaselmen kaj vidis la malnovajn ŝaktojn kaj amasojn da rubo, ni sciis, ke bonŝanco por akiri riĉojn tie, preskaŭ ne ekzistas.

Ĉiutage nia monprovizo malpliiĝis, sed rikolta tempo alproksimiĝis. Ni naskiĝis kaj vivis en farmbieno. Petro diris, ke pro tio ni povos trovi laboron ĉe farmisto ĝis la fino de la sezono.

Ni atingis la ĉirkaŭojn de la urbo Roŝestr' (Rochester), proks. 33 km. de la Nova Sud-Kimria limo, en iu sabato.

Ni haltas kaj metas niajn tornistrojn sur la teron apud akvotruo sub la ombro de gumaj arboj, kiuj kreskas ĉe la bordoj de la riveroj en Aŭstralio. Lerninte de Petro, en kia maniero oni povas fari kaj baki griaĵon sur varmega cindro, ni baldaŭ bruligas fajron, kaj post nelonge tri malsataj vaguloj manĝas plezure

---

eduki kaj solidarigi la familion.“ Tiu espero de s-ro Ĉörĉil, ke la plimulto da virinoj estas konservativaj, bedaŭrinde ne estas vana; ja oni de jarcentoj faris ĉion eblan, por ke la virinoj estu tiaj, kaj tial oni devas kalkuli pri la faktoj.

Sed ĉi tiu aĉa spekulacio pruvas nur mian aserton. Je kiom tio estas vera, tion mem la reakciuloj senvole perfidas, kiam Ĉörĉil klopodas trankviligi tiujn, kiuj havas kaŭzon timi pri ĉi tiu jura plivastigo de l' virinaro, dirante, ke la plimulto da virinoj malŝatas la renverson de l' sociordo.

Sed de kie venas la pensado, “kiel eduki kaj solidarigi la familion“? Ĉu ĝi estas disfalonta? Kial? Ja, la hodiaŭa formo de familio estas bazita sur korpo de la nuntempa socia sistemo. Familian vivon konstruitan sur alia ekonomia kaj socia fundamento oni eĉ ne povas imagi en la hodiaŭa socia strukturo.

Se tamen ĝi estas disfalonta, ĉu tio ne signifas, ke la hodiaŭa socisistemo tute maturiĝis por la pereo?

Ĉiam estis ŝatata devizo por la malamikoj de laborista movado, ke la socialismo tendencas detrui la familion. Ĉi tiu stulta akuzo per si mem disfalas, se ni konsideras la netolereblan situacion de la familio, kia ĝi fariĝis en la kadro de l' nuntempa socia ordo. Tre eraras tiuj, kiuj pensas, ke per konsento de la voĉdonrajto al virinoj ili povos plilongigi la daŭron de sia reĝimo. Tio nur estas lasta paŝo, kiu provizore iom helpas en ilia malespera situacio, kiu poste des pli rapide kondukas al fatala ilia fino.

Sed kio rigarde al la nuna situacio estas la plej grava tasko de la laborista movado? Neniel tio, ke la virinoj servu nur kiel iloj niajn celojn, en roloj similaj al la hodiaŭaj. La plej grava tasko estas klerigi la virinojn. Oni devas komprenigi al ili, ke la celo de homa vivo ne povas esti, ke la homo restu sklavo de la spiritaj kaj materiaj valoroj kreitaj de li mem, sed ke male ĉiuj tiuj valoroj servu al lia bono. Oni devas klarigi al ili, kial en la hodiaŭa sistemo de socio ili plej maljuste estas traktataj.

Plifaciligas tiun klerigan laboron simptomoj evidentiĝantaj de tago al tago rilate al agnosko de l' virina valoro fare de nunaj konservativuloj. En urbo Deptord oni elektis virinan urbestraron. Kiam oni konigis la rezulton, Harve (angle: Harvey), konsilanto, indigne frapis sur la tablon: “Mi ne sidos en konsilantaro prezidata de virino. Mi ĉiam kontraŭis la virinan voĉrajton. Mi vidas tre malluma la situacion de Anglio, ĉar la virinoj volas simie imiti la virojn[1]. Eble oni nomos min konservativema, sed mi havas la konvinkon, ke, se la viroj estus solidaraj, oni povus senigi la virinojn de l' voĉdonrajtoj kaj ankaŭ en la ekonomia vivo oni ne tolerus ilin. Se la virinoj postulas voĉdonrajton, ili ankaŭ estu pretaj preni sur sin la respondecon de la viroj. Se komenciĝus milito, estus ilia devo esti apud la viroj en la tranĉeo.“

Sed tio ne estas ĉio. Fondiĝis tielnomata “Fifthy-Fifthy“-Ligo, kies celo estas liberigi la virojn de l' “virina re-

[1] Vidu K. S t e i n e n : Meza Brazilio. Li mencias, ke sudamerikaj indianaj viroj simie imitas la akuŝon k knabonaskon. Ĉe la b a s k o j ankaŭ regis ĉi tiu kutimo.

varmegan bakitan griaĵon kaj frititan ŝafviandon.

Dum la longa marŝado de Melbörn ĝis Roŝest'r ni renkontis kaj preterpasis kelkajn aliajn vagulojn, britojn, germanojn kaj ĉinojn kiuj portis siajn tornistrojn kiel ni kaj same kiel ni serĉadis aĉetantojn de sia laborforto.

Petro, kiu estas trapasinta la lernejon de maldolĉa sperto, estas Marksa filozofo kaj klas-konscia laboristo. Antaŭ ol li forvojaĝis el sia hejmlando, li sidis antaŭ la piedoj de Karlo Marks kaj aŭdis lin paroli siajn senmortajn agitkriojn, kies eĥoj resonados tra la jarcentoj, ankoraŭ en la naskoperiodo de la formulo: "Proletoj el ĉiuj landoj, unuiĝu!"

Petro penadis laŭ gutoj fluigi en niajn junajn kaj senspertajn cerbojn la signifon de ĉe tiuj vortoj, kiuj estis lia religio.

Historio pri brut-rabistoj

Antaŭ krepusko, dekduo da vaguloj estis metintaj siajn tornistrojn sub la gumaj arboj, kie ni restis. La plejmulto el ili estis malnovaj vaguloj. Ili kutimiĝis je la vivo en Aŭstralia densejo. Ili reprezentis diversajn naciojn. Dum la mateno ili iom transpasis la Mörerriveron al Nova Suda Kimrio kaj raportis, ke ĉe sunleviĝo Kelliviroj, la lastaj de la Aŭstraliaj eksterleĝuloj, prirabis la ĉefon ĉe ŝafstacio kelkajn kilometrojn norde de Roŝest'r. Per pafilo ili devigis lin provizi ilin per manĝaĵo kaj freŝaj ĉevaloj, poste ligis liajn manojn kaj piedojn, same liajn dungantojn por malhelpi, ke ili avertu la policistojn, antaŭ ol ili atingis distancon de la loko. La Kelli-viroj originale estis salajraj sklavoj. Sed lacigite de ekspluatado, ili komencis ekspluati siajn ekspluatantojn, per alproprigo de iliaj senmarkaj brutaroj, ĉevaloj kaj bestoj, kaj tial ili estis nomataj "eksterleĝuloj".

La bando de la Viktoriaj Policistoj serĉis ilin. Kiam la policistoj estis en tendaro, kiel ili opiniis, ĉe maldanĝera loko, iuj vagis en la densejon por pafi kanguruojn, dum la aliaj restis en la tendaro por fari la kuiradon. Kiam ili staris antaŭ la fajro, iliaj pafiloj estis flanke, subite iu, per mallaŭta voĉo, ordonis "Manojn supren"; kaj kiel ili turnis sin al la loko, de kie la sono venis, ili vidis la Kelli-virojn kun pafiloj pretaj por pafado. La "eksterleĝuloj" ligis iliajn manojn kaj piedojn, metis ŝtopilojn en iliajn buŝojn kaj atendis kovrite la revenon de l' aliaj. Kiam tiuj videbliĝis, la Kelli-viroj pafis ilin. Unu forkuris kaj raportis la okazojn. La Kelli-viroj sukcesis eviti la aŭstraliajn policistojn dum kelkaj monatoj; finfine ili estis kaptataj, juĝataj kaj kondamnataj al mortpuno.



ĈU VI VOLAS AKOMPANI MIN AL LEIPZIG, K-DO!

Pastro predikas al ni humilon kaj obeemon

Ĉe sunleviĝo, en dimanĉa mateno, iuj el niaj amikoj promenis serĉante ĉasaĵojn, kaj post du horoj revenis portante kuniklojn kaj malgrandan kanguruon. Ĉiuj klopodis kaj tagmeze ni pretigis du specojn da viando por tagmanĝo.

Ĉirkaŭ la 14-a horo, flikante mian ekstran ĉemizon, mi ekrigardis al la strato; tie iu sinjoro alproksimiĝis la tendaron, vestita kiel pastro, kun kvar sinjorinoj, el kiuj du portis akordeonetojn[1]. Mi kredas, ke dum la tiamaj tagoj la uniform-vestitaj, komercistaj, vojaĝemaj, monpetantaj religiuloj de la Savarmeo ankoraŭ ne velkigis la spiritojn de Aŭstraliaj laboristoj. Kiam ili atingis la tendaron, la sinjorinoj, kiuj portis la akordeonetojn, komencis ludi la preludon de himno. La pastro gvidis la kantadon. Dum la prezentado mi rigardis al Petro kaj rimarkis cinikan rideton sur lia vizaĝo. Evidente li dubis. Kiam la kantado ĉesis, la reprezentanto de dio prenis el sia poŝo la sanktan biblion kaj elektis kiel tekston verson el la Prediko sur la Monteto. Li legis: "Benataj estas la humiluloj, ĉar ili heredos la Teron". Li komencis konsili al ni, timi dion, esti honestaj al niaj dungantoj-kiam ni havas iun. Li speciale emfaze parolis pri la laborista devo: esti kontentaj pri la pozicio, kiun dio en sia senlima saĝeco disponis al ili.

Spite la fakto, ke furiozo de kvindek jaroj da batalo por vivrimedoj, kune kun la forpaso de l' tempo, ĉizis sulkojn sur mia frunto kaj grize koloris miajn harojn, mi ankoraŭ hodiaŭ vidas la memkontentan vizaĝon kaj figuron de la parazito, kiu, kiel altpagata servisto de la ekspluatantoj al malriĉuloj, provis pumpi superstiĉon en niajn mensajn organojn. Ĝuste ĉe n i n li venis, kiuj ekster la amika ŝirmo de la gumaj arboj ne havis lokon por kuŝigi la kapon...

Maljunulo (10664), Anglio.

[1] Tirharmonikoj.



FAKTOJ SEN KOMENTOJ

Oni ŝirmas la moralon en Usono

Sinjorino M. W. Dennett devas aŭ pagi 300 dolarojn aŭ resti en malliberejo dum 300 tagoj. Kial tiu puno? Ĉar ŝi enpoŝtigis ekzempleron de sia propra broŝureto unue verkita por informi siajn filojn pri seksfaktoj. Multaj preĝistoj kaj kolegiestroj atestis ĝian valoron. En ĝi ŝi fine pledis por la monogamio. Eĉ la asocioj de la Junkristanaro (Y. M. C. A. kaj Y. W. C. A.) disdonis kaj rekomendis ĝin. Sed la broŝureto laŭ la opinio de literatur-juĝantaro en Novjorko donas al la legantoj malpuran penson. Tial la verkintino estis kondamnata laŭ la famaĉa leĝo Komstok (Comstock), kiu malpermesas la enpoŝtigon de "malpura" literaturo.

Kiel en aliaj landoj, oni povas, se oni scias peti pri tio, aĉeti en preskaŭ ĉiu usona drogejo naskevitilojn. Sed endanĝerigus la kapitalistan sistemon, se ĉiu laboristo scipovus limigi la provizon de estonta laborpovo. Bonŝancon havis s-ino Dennett, ĉar ŝi nun ricevis multe da reklamo kaj ŝia broŝuro vendiĝas pli multe pro la sensaci-proceso. Jam sume 22 milionoj da ekzempleroj estas disvenditaj! La reakcio vane kontraŭbatalis la tajdon antaŭeniĝantan de l' oceano el scio. (488)

Klasjusteco!

Antaŭ unu monato la burĝo Kostov (Bulgario) mortigis sian edzinon kaj ŝian amanton en sia propra hejmo. Nun oni liberigis lin, ĉar "li defendis la honoron de l' familio kaj donas bonan ekzemplon al aliuj". Preskaŭ samtempe okazis granda eksplodo en la militista arsenalo, kaj estis vivbruligataj ĉ. 30 gelaboristoj kaj multaj vundataj. La ministra konsilantaro tuj decidis doni unu milionon da levoj al la suferintaj familioj. Sed... tio restis nur decido surpapera por trompo al laboramasoj, por ke ili ne protestu. Nun oni juĝis la altrangajn oficirojn, kiuj gvidas la arsenalan laboron. Kaj... pro nepruvebleco de l' kulpigoj oni ne kondamnis ilin!

Sed, jen nur unu alispeca ekzemplo. K-do Denĝerkov, redaktoro de "Novaĵoj", skribis en unu humora versaĵo, ke nune regas ĉe ni ne Ljapĉev (ministro-prezidanto), sed "ZZZ" ("Leĝo por defendo de l' ŝtato"); kaj oni kondamnis lin je unu jaro pro ofendo al ofica persono!

Faŝista juĝistaro! Diablido.

gado" kaj kiu eldonas dusemajnan organon. Tiu gazeto postulas krom rekrutigo de l' virinoj por soldata servo, ke estu ĉesigataj ĉiuspecaj seksaj privilegioj, cedoj aŭ imunoj[1]. Ĝi postulas la nuligon de tiaj leĝoj kaj dekretoj, kiuj liberigas la virinojn de ekonomiaj konsekvencoj el iliaj agoj kaj konforman modifon de l' geedziĝa leĝaro.

Tiel jam en nuna socia stato viroj konservemaj klopodas liberigi sin de imaga jugo, kiam virinoj penas rericevi siajn naturajn rajtojn. Je iniciativo de virinoj jam falis prasocia ordo kaj kontraŭecoj trafintaj ilin en ekonomiaj-sociaj rilatoj[2]. Sed tiel longe, kiel ekzistas la privat-propraĵo, ankaŭ la virinoj devos batali ankoraŭ por siaj rajtoj, kiuj estos finakiritaj nur kun la pereo de l' nuntempa soci-ordo. Fero.

[1] La seksaj privilegioj ĝuataj hodiaŭ de virinoj baziĝas sur ŝarĝoj, per kiuj la naturo ŝarĝis ilin en laboro de ras-ekzistado (—? Red.). Sed tiuj privilegioj ne estas proporciaj je de virinoj farata laboro. Postuli ilian ĉesigon estas manko de karaktero kaj stulteco.

[2] Vidu Engels: La deveno de familio, privatpropraĵo kaj ŝtato; Bachoffen: La patrinrajto.

SENNACIULA LIBERPENSULA PAĜO

N-o 6 REDAKTAS LIBERPENSULA SEKCIO DE SAT N-o 6
Manuskriptojn sendu al: KURT HUBRICHT, Leipzig O 30, Mariannenstrasse 22. Sekretario de la Sekcio: KURT KLAPS, Danzig, Karpfenseigen 12

JESUO BARABBAS

En sveda lingvo ne aperas liberpensula gazeto, ankaŭ ne multe da liberpensa literaturo. Nur la komunista gazetaro enhavas kontraŭreligiajn artikolojn. Dum la lasta tempo aperis multe da religia literaturo, kaj multaj pastroj pledas por kunlaboro inter ŝtateklezio kaj socialdemokratio. Ĉefpastro Thysell skribis libron: "Kristanismo kaj la laborista movado", en kiu li montras per ekzemploj, kiel socialdemokrataj gvidantoj svedaj pli kaj pli komencis vere interesiĝi pri religio kaj kiel ili per siaj agoj helpas la eklezion. Sed pri tio alian fojon mi parolos.

Aliaj teologoj nun treege diskutas la problemon pri Jesuo. Kelkaj teologoj ankoraŭ diras, ke Jesuo ne estis nature naskita, dum aliaj pledas por lia natura naskiĝo. Kelkaj predikas ankoraŭ pri lia reviviĝo, dum aliaj diras, ke li nur estis ŝajne mortinta kaj aliaj tute neas pri lia reviviĝo.

Dum la pastroj diskutas pri la plej certa vojo al la ĉielo, dum ĉiuj predikantoj, al kiu ajn religio ili apartenas, savas homojn por bona monsumo, tamen aperas homoj, kiuj ŝercas tre akre kun la trompuloj, en formo de satiro mokas la malsaĝon.

Sveda aŭtoro Hjalmar Söderberg aperigis libron sub la titolo: "Jesuo Barabbas", en kiu li citas kelkajn tre gravajn fontojn, kiuj kontraŭdiras al la predikoj de la pastroj. La ĉefpersono de la libro estas maljuna leŭtenanto, ribelanto kontraŭ la religiaj kredoj. Li loĝas en Kopenhago kaj havas kamaradrondon el aliaj ĉiuspecaj pekuloj, tre inteligentaj homoj, kiel ekzemple antikvaĵvendisto Marin, sperta en teologio, konante diversajn fontolibrojn en greka kaj aramea lingvoj. En sama domo loĝas Kasper, artisto. Tiuj tri homoj kaj kelkaj aliaj ofte drinkas kelkajn glasojn da brando kune en vindomo "La granda marserpento". Ĉe la glasoj oni volonte diskutas religiajn temojn. Ni povas aŭdi diskutojn tiajn:

"— — Por la diablo, kion vi diris, Kasper, ĉu oni aliformigas la biblion?" —

— Jes, respondas Marin, oni ĉiam aliformigis kaj ŝanĝis la enhavon de la biblio kaj tion oni ankoraŭ faras. En la biblio de via patro, se li havis tian, estis skribita, ke Jesuo respondis al sia patrino, dum la geedziĝa festo en Kana, kiam ŝi volis montri sin lerta kaj petis Jesuon mirakle havigi kelkajn botelojn: "Virino, kion mi havas kun vi?" Sed en la plej nova biblio, la biblio de reĝo Gustavo V, estas pli boneduka tono, ĉar tie estas skribite, ke Jesuo diris: "Lasu min, patrino".

— Sed, estas plej kredeble nur traduka eraro, ili korektis, — diris Kasper demandante.

— Ne, male, estas nova erartraduko, ili faris al ĉiuj aliaj tekstoj, respondis Marin."

Leŭtenanto Jaegerstam vizitis la lokojn, kiuj estas priparolitaj en Nova Testamento kaj ŝajnis al li, ke li rekonis la lokojn, kaj li ekmemoras kaj rakontas al sia amikaro, ke lia animo en pli frua tempo estis enlokita en tajlorokorpo en Galileo, kie li estis filo de tajloro. (En tiu ĉi okazo la aŭtoro do uzas la religion pri renaskiĝo por pruvi, kion li diras. Vere bona ŝerca metodo. Se la religiuloj neas pri lia rakonto, ili same bone devas nei pri la ebleco renaskiĝi.) El sia infaneco tie ĉ. 1900 jarojn pli frue ol ni vivas, li memoris junan viron kun la nomo Jeŝuo aŭ Jesuo, filo de masonisto Josefo. Jesuo estis inteligenta knabo; tial li venis kiel tajlorlernanto al mia patro, rakontas leŭtenanto Jaegerstam, kaj daŭrigas: "Mi memoras, ke mia patro ne trovis lin sufiĉe diligenta kaj lian karakteron ŝanceliĝanta. Tamen, por la tajlora metio li ne havis talenton." Estis je la tempo, kiam unu Mesio kun nomo Juda-Juda de Galileo organizis ribelojn en Galileo, kaj kiam Jesuo dum kelkaj tagoj estis for, liaj fratoj timis, ke li aliĝis al la ribelantoj. Sed baldaŭ oni eksciis, ke Jesuo mem vagadis predikante. Li legis libron, kiu dum tiu tempo estis tre ŝatata plezurlegaĵo, nome: "La aperaĵo de Daniel". Tiu libro aperis ankaŭ en aramea lingvo, kiun la malriĉa klaso konis. La libro pri Daniel profetis pri Mesio, kiu alvenos por savi la judan popolon el la premo de la romanoj. Tion Jesuo legis, kaj nun li predikis la samon. Baldaŭ li eĉ imagis sin mem esti la "Homofilo", la vera Mesio. — Dum tiu tempo ja estis multaj, kiuj trompis la popolon, asertante, ke ili estas la antaŭ-anoncita Mesio. Al tiuj falsaj mesioj la judoj donis la nomon "Barabba". La aŭtoro provas pruvi, ke la vorto "Barabbas" devenas de la vortoj "bar" = filo kaj "abba" = patro, kaj ke en la biblio priparolitaj Jesuo kaj Barabbas estas la samaj personoj, ĉar iafoje oni parolas pri Jesuo, aliam pri Barabbas kaj pri Jesuo Barabbas.

Dum la paskotempo estis en Jerusalemo grandaj festoj de la judoj. Okazis, ke Jesuo alvenis tien dum paskofesto. Jaegerstam rakontas, ke dum tiu tempo li vizitis Pilaton pro ia oficiala tasko. Okazis ribeloj sur la Temploplaco. Roma militistaro alvenis kaj estis grava interpuŝiĝo. La anoj de Jesuo, kiuj ne havis armilojn, forkuris, sed multaj vundiĝis kaj multaj mortigitoj restis sur la placo. Kelkajn oni arestis, kaj unu el la arestitoj sciigis, ke Jesuo, kiun la romanoj suspektis kiel ribelgvidanton, dum la lastaj noktoj loĝis en malplena oleobarelo en Getzemane, ĉe l' Olivmonto. Kaj tie la soldatoj trovis lin. La kaŭzo, kial li ne forkuris, diras Jaegerstam, dependas de tio, ke li mem kredis pri helposoldatoj de la Ĉielo. Dum la juĝoproceso la anoj de Jesuo ne ĉeestis. Pilato juĝis: "Vi nomis vin la reĝo de la hebreoj. Vi aranĝis ribelon. Vi devas morti sur la kruco" — tre ordinara puno por ribeluloj. Sed Antipas volis vidi Jesuon, kaj kiam oni gvidis lin al Antipas, tiu treege ŝercis kun li, moke li vestis lin kiel reĝon. Antipas pritraktis Jesuon kiel konkuranton, kaj nun li ĝojis, ke ĉi tiu konkuranto devus morti.

Oni ree kondukis Jesuon al Pilato kaj la popolo kriis: "Liberigu al ni Jesuon. Donu al ni Jesuon Barabbas!"

Kaj ĉar Pilato aŭdis, ke Antipas ŝercis kun Jesuo, li decidis liberigi Jesuon por moki Antipason. Kaj Pilato sciigis... "Judoj, okaze de via solena festo mi tiun ĉi fojon volas montri min humana Jesuo Barabbas estu libera!"

Kien Jesuo poste migris, mi ne scias, rakontas Jaegerstam. Sed kiam mi du jarojn poste estis en Tiberio, mi ekaŭdis, ke inter la malnovaj amikoj de Jesuo kaj liaj anoj en Galileo estis vera, senduba kredo, ke oni krucumis lin. Kiam mi pripensis, mi trovis ilian kredon tute natura, mi komprenis, kiamaniere la kredo aperis. Neniu el la plej proksimaj amikoj de Jesuo, neniu el liaj nunaj lernantoj kaj apostoloj ĉeestis la juĝejon. Kaj ili ne povis scii kaj tute ne kredi, ke Pilato liberigis lin. La fiŝkaptisto Simono kaŝis sin en la proksimo de la urbo, ne kuraĝis sin montri. Tiel ankaŭ same okazis kun la aliaj. Sed el la eksteraĵo de la urbo ili vidis, kiel oni starigis krucojn sur Pendigilmonteto, altaĵeto norde de la urbo, kaj ili vidis, kiel malliberigitoj juĝataj pro mortigoj ktp. dum la ribelo estis pendigataj. Eĉ ne momenton ili povis ne kredi, ke Jesuo ne estis inter la pendigitoj. Ili vere povis, en bona kredo, diri, ke ili per propraj okuloj vidis kiel oni krucumis Jesuon.

Sed la fiŝkaptisto Simono renkontis lin kelkajn tagojn poste. Simono povis ĵuri, ke li vidis lin tute vivanta, kia li estis antaŭ la krucumo, kaj Jesuo eĉ manĝis du rostitajn fiŝojn, por kiuj Simono lin invitis, kaj du religie kredantaj virinoj same lin vidis. Kaj poste multaj aliaj ne volis esti malpli bone informitaj. Baldaŭ estis multaj, kiuj diris, ke ili vidis la krucumon sur la Pendigilmonteto kaj ke ili poste vidis Jesuon vivanta. Tiel, fidindaj personoj, kiel Simono, povis garantii, ke li reviviĝis el la morto. Oni kredis tion, kaj per tia kredo la reviviĝo valoris kiel pruvita.

En tia formo la leŭtenanto Jaegerstam

Literaturon
riĉan bezonas SAT.!

Vi helpos trafe al ĝia kreado, aĉetante la **AKCIOJN** de la **ELDON-KOOPERATIVO!** — Prezoj:
Serio A = 1 dolaro,
Serio B = 1/2 dol.

Turnu vin al la Administrejo de SAT, Colmstr. 1, Leipzig O 27.

TRA ESPERANTIO

"Ni ignoras la kleran okcidenton!"

Tiel kriis ebrie-raŭke antaŭ kelkaj jaroj hungara parlamentano — kaj la nuna Horti[1]-reĝimo efektive faras tion. Kvankam Hungario geografie lokiĝas meze de Eŭropo kaj la kalendaro montras la 20-an jarcenton, tamen niaj potenculoj faras ĉion eblan, por translokigi la "karan patrion" al Honolulu kaj reŝraŭbi la tempomontrilon almenaŭ je 4—5 jarcentoj. La lando jam estas ekonomie tiel izolita, kvazaŭ ĝi vere ne jam estus en Eŭropo, kaj ankaŭ politike sufiĉe oni sukcesis restarigi la feŭdan despotismon. Ĉio estus bona, nenio malhelpus la belan sonĝon de lakt- kaj mielabunda sinjora Kanaano, se la "klera okcidento" aŭ ankaŭ ofte la "ruĝa oriento" ne infektus ĉiam refoje tiun ĉi ĉielan harmonion. Sed la ĉinia muro de doganoj kaj la densaj arbaroj de bajonetoj ne kapablas haltigi la venton blovantan de okcidento, de oriento, ne kapablas reteni la ĝermojn, kiujn ili kunportas. La aglokuloj de doganistoj, la kugloj kaj grenadoj de kanonoj ne multe malhelpis la nevideblajn, nekapteblajn kuraĝajn pensbakteriojn, kiuj impertinente ŝatas enmigri ĝuste tiujn landojn, kie ankoraŭ regas malhela mezepoko. La historio ja pruvas sufiĉe la vantecon de atakoj kontraŭ la spirito.

Tamen kiel la instruoj de historio koncernas la reĝan hungaran policon? Evidente neniel. La polico ne estas kreita por scii la historion, ĝi havas la taskon pikbati per sia glavo la etajn bacilojn de l' penso. Sed tiun ĉi taskon ĝi plenumas sentime kaj senhezite. Jen la pruvo. En la urbeto Orosháza la polico malpermesis refondon de lab. esp. grupo, ĉar la anoj eble uzus sian esp.-scion por akiri eksterlandajn politikajn rilatojn!

Laŭ sama motivigo oni certe malpermesos baldaŭ la instruon de aliaj fremdaj lingvoj. Kaj se ĝi kapablus, la polico de Orosháza malebligus ankaŭ tion, ke alilandanoj lernu hungare, ĉar ja tiel denove povas veni al ni la kleriga epidemio, aŭ ĉu la furiozo direktiĝas nur kontraŭ esp-o? Ŝajnas esti tiel.

Antaŭ kelke da tempo pastro predikante kontraŭ esp-o deklaris, ke ankaŭ la verdaj fruktoj de ĉerizarbo ruĝiĝas poste. Kaj la policministro certigis en la parlamento, ke li tre bone scias, kio sin kaŝas sub la verda stelo. Nu, la provincaj ĉashundoj de sia ekscelenco ne bezonas pli multon, por ke ili enkonduku novan peloĉason.

Kompreneble la budapeŝta politika fako de la polico envias la "meritojn" de l' provincaj samfakanoj. Krome jam depost longe ne estis eble malkaŝi konvenan "bolŝevikan komploton". Oni ja devas ion produkti, por ke oni ne estu eble maldungota. Oni provis do malkovri "esp-istan komploton". La ĉiam servopreta poŝtdirekcio, kvankam kontraŭ-leĝe, sed sen konsciencripoĉoj transdonis la adresojn de "S-ulo"-abonantoj. Domesploro estis farata ĉe ĉiuj. Trovitaj n-oj de "S-ulo" estis forrabataj triumfe. Pli multe da sukceso ne estis! La disvastiganto R. Lerchner el Leipzig ne estis arestebla. "S-ulo" transvivos ankaŭ ĉi tiun persekuton.

Jen kiel statas la lab. esp. movado en Hungario. Kaj la burĝa? Trumpetsone estis anoncita en- kaj eksterlande la nunjara budapeŝta kongreso. La urbaj oficuloj faris kelkajn favorajn deklarojn pri esp-o, ĉar la mortaĉantan fremdultrafikon de mortaĉanta urbo oni esperas plivigligi pere de la kongreso. Sed la ministro riproĉis akre la urbestron pro la favorigo al tiel "suspektinda" entrepreno. La malmultaj rusaj entreprenemuloj, kiuj volis veni al la kongreso, ne ricevis enirpermeson. Pri tio la burĝaj gazetoj raportas, ke rusoj ne volas veni pro la kongreso, sed tiu ĉi "minaco" ne embarasis la kongresaranĝantojn. Jam "kvinmil reprezentantoj de 50 nacioj sin anoncis ĉe la polico". (Ĉar esp-istoj, eĉ burĝaj, devas sin anonci ĉe la polico en Hungario.) La programo de la kongreso laŭ la raportoj de l' burĝa gazetaro enhavos ĉefe propagandon por la teritoria unueco de antaŭmilita Hungario. Pri tio la bohemaj, rumanaj kaj sudslavaj kongresanoj certe tre ĝojos! Ankaŭ la interfratiĝon tre servos la budapeŝta kongreso.

En tiaj cirkonstancoj ni povas nur saluti la rezolucion de Hungaria Esp. Societo Laborista, kiu estante la plej granda enlanda organizo decidis ne partopreni la aranĝon de la kongreso. Pri tio burĝaj gazetoj povas plori kaj ŝtatpotencoj furiozi, la lab. esp-istoj devas tamen iri la rektan vojon de kontraŭpatriotisma internacieco.

[1] Hungare: Horthy.

---

rakontas, per la plumo de sveda burĝa aŭtoro. Eĉ se ne estas science pruvita ĉio, kion diras la aŭtoro, oni devas konfesi, ke la libro estas valora. Ĝi montras, kiel la homoj malgraŭ ĉio komencas trakti la historion pri la nenatura naskiĝo kaj la reviviĝo kiel fabelojn, kaj la nebuloj de la religio ankaŭ plene foriĝos.

La burĝaj gazetoj de Svedio kompreneble tre akre kontraŭagitas la libron; la religiuloj estas frenezaj en sia malamo kontraŭ tiu, kiu tiel prave ŝercas kun iliaj dogmoj.

Einar Adamson (SAT-ano 902).

GRAVAJ INFORMOJ

La Internacio de Proletaj Liberpensuloj (IPF, Vieno) planas eldoni la gazeton "Atheist" (Ateisto) ankaŭ esperantlingve. En Sovetio, Germanio kaj Svedio estas fonditaj en la LEA-organizoj "Liberpensulo-Sekcioj".

13 607. Vian artikolon mi sendis al la redaktoro de l' Scienc-Kultura Paĝo.



9-a Kongreso de SAT

en Leipzig (Germ.) 4.—10. aŭg. 1929

9-a KOMUNIKO

Ne sufiĉe ni ĝis nun alarmadis inter la Laborularo pri nia Kongreso, kvankam la K. K. en preskaŭ ĉiu n-o de "S-ulo" liveris al vi faktojn diskonigendajn per gazetoj k ĵurnaloj. Nur kelkaj (tro malmultaj!) Gek-doj modele eluzis la Kongreskomunikojn...

Mendu senprokraste afiŝojn k sigelmarkojn. La prezoj estas plej modestaj: 6 afiŝoj 0.50 mk. g., 14 afiŝoj 1.— mk. g.; folio da sigelmarkoj kostas nur 0.50 mk. g.

La ilustritaj poŝtkartoj de la Popoldomo (Leipzig-a) preskaŭ elĉerpiĝis, kvankam nur antaŭ kelkaj semajnoj ni ekpropagandis por ili. Kuraĝigite ni mendis ankoraŭ du aliajn specojn da poŝtkartoj (magistrata domo k stacidomo; alia prezentos la lab. gimnastk sportlernejon). La prezoj restas samaj: 6 kartoj 0.50 mk. g., 14 kartoj 1.— mk. g.

Mendojn k aliĝilojn sendu al K-do W. Kampfrad, Löbauer Str. 35, Leipzig N 24 (Germanio). Monon por propagandaĵoj k aliĝo sendu per adm. aŭ poŝtĉeka konto de SAT — monbiletojn sendu senpere al K-do W. Kampfrad. Germanianoj nepre uzu poŝtĉekon: W. Kampfrad, poŝtĉeka konto 13 527, Leipzig.

Pasportoj estas necesaj por ĉiuj negermanianoj. Detalojn rilate al pasportoj k vizoj legu en antaŭaj Komunikoj.

Monŝanĝado povos okazi dum la Kongreso en Leipzig. Sovetianoj tre atentu, ke ili neniel povos ŝanĝi sovetian monon en Germanio. Nepre ili devas ŝanĝi la necesan monon por veturo k restado antaŭ forlaso de Sovetio.

Ekspozmaterialon, sed nur plej valoran, sendu senprokraste al K-do F. Emmrich, Fichtestr. 102, Leipzig S 3 (Germ.).

Veturlibro "tra Germanio per esperanto" ne aperos (proponita de rusa K-do). Sed en sekv. semajnoj aperos en "S-ulo" specialaj atentigoj pri sinteno k kondiĉoj dum veturado per germanaj fervojoj.

Perspektivoj por la Kongreso estas tre favoraj (nur aliĝoj ankoraŭ mankas); la urbo Leipzig decidis monan subvencion de 2500 markoj (1000 markoj jam ricevitaj); de l' Germana Regno ankaŭ ni ricevis 500 markojn.

Informpetojn adresu al: K-do F. C. Richter, Lochmannstr. 2, III, Leipzig O 27 (Germanio).

Veturprezoj per rapidvagonaro — 3-a klaso

Demandoj pri veturprezoj ĉiam denove trafas nin, kvankam jam dufoje ni publikigis ilin. Ni refoje publikigas ilin k samtempe atentigas, ke nature la prezoj nur estas por alveturo (reveturon vi devas sampreze kalkuli). La prezoj estas donitaj laŭ mk. g.

Berlin—Leipzig	7.70
Breslau—Leipzig (karavane)	14.70
Bruxelles—Leipzig	31.90
Budapest—(Praha)—Leipzig	36.80
Bukarest—(Praha)—Leipzig	67.20
Danzig—Leipzig	28.40
Düsseldorf—Leipzig (karavane)	18.50
Kehl—Leipzig	27.60
Kiev—(Berlin)—Leipzig	56.00
Köln—Leipzig	25.40
Königsberg—Leipzig	33.20
Leningrad—(Berlin)—Leipzig	79.50
London—(Ostende)—Leipzig	56.25
Malmö—Leipzig	35.80
Minsk—(Berlin)—Leipzig	45.65
Moskvo—(Berlin)—Leipzig	80.20
München—Leipzig	23.20
Paris—(Köln)—Leipzig	40.60
Praha—Leipzig	15.90
Regensburg—Leipzig (karavane)	14.10
Riga—(Königsberg)—Leipzig	45.00
Rostock—Leipzig (karavane)	9.50
Saarbrücken—Leipzig	27.00
Stettin—Leipzig	15.20
Trier—Leipzig	28.00
Varsovio—(Breslau)—Leipzig	34.30
Vieno—Leipzig	31.50
Zürich—Leipzig	34.90

10-a listo de aliĝintoj

406	Chr. März, Mannheim, Germ.	9 498
407	E. Bepperling, Erzhausen, Germ.	12 896
408	Otto Mälzer, Eichgraben, Germ.	5 787
409	Rudolf Herrmann, Gera, Germ.	5 955
410	D. Prochaska, Nürnberg, Germ.	6 326
411	Mario Mikstätter, Hallein, Germ.	2 019
412	Wilhelm Michalski, Berlin	9 534
413	Karl Pahlke, Berlin	13 553
414	Walter Noak, Pirna, Germanio	11 763
415	Andre Nicolle, Semur en Auxois, Francio	3 489
416	Otto Röder, Leipzig	11 751
417	Hans Wirz, Zürich, Svisio	1 446
418	Georgo Polevik, Kiev, Sovetio	?
419	Izraelo Carovskij, Kiev	8 744
420	Mihaelo Vail, Kiev	5 656
421	Mozeo Izgur, Kremenĉug, Sov.	3 870
422	Elio Izgur, Kremenĉug	2 332
423	Cecilio Izgur, Kremenĉug	3 869
424	M. I. Popov, Mitiŝĉi, Sovetio	8 394
425	Ida Lisiĉnik, Sebastopol, Sov.	3 632
426	Molokov-Jursk, Kremenĉug, Sov.	14 683
427	Stefan Bogdanov, Lugansk, Sov.	4 604
428	Petro Kozlov, Smolensk, Sov.	6 848
429	L. Belajev, Niĵnij-Novgorod, Sov.	4 312
430	Leoĝo Kapustin, Moskvo	10 382
431	Franz Beliĉ, Aalsmeer, Holando	13 242
432	Emilio Artigas Trigo, Zaragoza, Hispanio	2 461
433	Arnold Radöske, Stettin, Germ.	13 445
434	Fritz Riechert, Stettin, Germanio	13 444
435	Paul Beyer, Leipzig	6 885
436	Hermann Schuberth, Duisburg, Germanio	7 037
437	Jos. Graef, München, Germ.	13 097
438	Willi Weinbach, Kändler, Germ.	5 836
439	Oswald Bernhard, Limbach	10 593
440	Ludw. Gammel, München, Germ.	1 811
441	Emil Strohmeier, München	9 805
442	O. Günther, Schwoitsch, Germ.	7 470
443	P. Günther, Schwoitsch, Germ.	7 763
444	Kurt Bach, Gröbers, Germ.	10 006
445	Herm. Oelmann, Gröbers, Germ.	13 207
446	W. Günther, Schwoitsch, Germ.	13 440
447	Rudolf Lemdche, Gröbers, Germ.	13 441
448	Willy Günther, Gröbers, Germ.	13 442
449	Fr. Mathieu, Montlucon, Francio	1 059
450	Fr. Marival, Tours, Francio	12 858
451	Emile Péroux, Saint-Pierre-des-Corps, Francio	11 703
452	Paride Valla, Cagnes, Francio	13 056
453	A. Richter, Walterhausen, Germ.	14 726
454	Werner Habicht, Waltershausen, Germanio	14 727
455	L. Romanovski, Kozlov, Sovetio	12 974
456	Mikaelo Klimentov, Kozlov, Sov.	13 843
457	Boris Petrov, Kozlov, Sovetio	13 325
458	B. Jeleznjakov, Samara, Sovetio	5 583
459	M. Golovanov, Samara, Sovetio	14 702
460	Nikolao Necenko, Samara, Sov.	12 116
461	Erik Olsson, Landskrona, Svedio	14 260
462	Alfr. Thonney, Lausanne, Svisio	150
463	Simon Kojajev, Elektroperedaĉa, Sovetio	10 779
464	Karl Treitz, Frankfurt, Germ.	?
465	Charles Matthews, St. Albans, Anglio	11 664

Donacoj

Riechert (Stettin) 2.— mk. g., Radöske (Stettin) 2.— mk. g., Graef (München) 1.— mk. g.

KOMUNIKO DE LA PLENUM-KOMITATO

La Plenum-Komitato opinias necese atentigi la SAT-anaron pri la artikolo 29 de la Statuto, kiu tekstas jene:

"Ĉiu ano aktiva de SAT rajtas sendi proponojn pri la agado de la Asocio al Pl. Komitato, kiu — post ekzameno — ilin publikigos en la oficiala gazeto, tiom kiom la spaco permesos. Principaj proponoj estos publikigitaj almenaŭ, en la antaŭlasta n-o de 'S-ulo' aperanta antaŭ la Kongreso."

K-doj dezirantaj fari proponojn al la Kongreso ne prokrastu sendi ilin por publikigo. Por eviti ĉian eksterregulaĵon, nur la publikigitaj proponoj estas diskutotaj ĉe la Kongreso.

Plenum-Komitato de SAT.

PRI LA JARLIBRO

El Kiev

Ege salutante opiniojn pri Jarlibro 1929, esprimitajn en letero de K-do Izgur (n-o 240) k en propono de K-do 518 (n-o 241), ni petas aldoni niajn subskribojn al iliaj deziresprimoj. Ni esperas, ke la Leipziga Kongreso decidos la demandon por kompleta Jarlibro 1929.

D. Viktorov-Ĉehoviĉ (5627), B. Egers (4544).

El Grenoble

"... En nia grupo de Grenoble (Francio) ĉiuj K-doj SAT-anoj malaprobas la decidon aperigi en la nova Jarlibro nur du adresojn en ĉiu urbo. Mi mem opinias, ke devus aperi almenaŭ la adresoj, kiel kutime, de la novaj SAT-anoj. Verdire rilate al la malnovaj ne gravus, ĉar oni povas trovi ilin jam en la antaŭaj Jarlibroj. Mi akordiĝas pri tio kun K-do Izgur (n-o 240).

J. Coll, (7998).

Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: "Kiu pli laŭte krias, tiu estas prava!" Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide, ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune.

L. L. Zamenhof.

INTER NI

K-do Umo asertas, ke la mondlingva movado ne progresas rapide, tial ke esperanto ne estas sufiĉe perfekta lingvo. Liadire, se oni akceptus la reformetojn, kiujn li proponas aŭ aplikas mem, ni vidus nian aferon progresi rapide.

K-do Jeo emfazas, ke se SAT akceptus la programon de lia partio, ĉi lasta tariĝus simpatia al nia lingvo k certe akceptus ĝin.

Ambaŭ K-doj estas tre sinceraj, konvinkitaj k pretas defendi sian vidpunkton ĝis mortkondamniĝo — ekskluzive.

Kaj ekzistas multaj aliaj K-doj, kiuj kredas, ke sufiĉus alpreni la de ili proponatan rimedon aŭ taktikon por baldaŭ atingi la "celon en gloro".

Mi estas tiaulo, kiu ne kredas, je baldaŭa efektiviĝo de niaj deziroj. Sed ne estas malutile esploreti pri la kaŭzoj de tiu malrapida progreso. Laŭ mi, la ĉefa kaŭzo estas, ke ĝenerale la esperantistoj mem ne sufiĉe konscias pri la gravo de la ilo, kiun ili uzas. Estus eĉ pli ĝuste diri, rilate al kelkaj: per kiu ili kvazaŭ ludas. Ja, por granda nombro da esperantistoj la partopreno en nia movado estas ia ludo, ia modo, kiujn ili forlasas, tuj kiam logas ilin alia modo.

Por konscii la gravon de la esperanta afero, necesas kompreni la grandan rolon, kiun ludas la tekniko, la artefaritaĵo en la evoluo de l' homaro; necesas kompreni, ke la artefarita lingvo estas ia teknikilo, kies manipulado k aplikado postulas tute apartajn zorgojn, por sin trudi al la granda publiko.

Tia ilo ne povas akiri ĝeneralan akcepton, se precipe mallertuloj ĝin uzadas. Sed ni supozu, ke Tolstoj, R. Rolan, H. Barbüs, M. Gorki k. a. famaj verkistoj, anstataŭ diri kelke da bombastaj frazoj por esperanto, ĝin ellernus k per ĝi verkus: ni supozu, ke Jores, Bebel, Lenin k. a. influhavaj gvidantoj parolus en nia lingvo dum internaciaj kongresoj; ni supozu ...,— la leganto mem daŭrigu la supozon. Nu, ĉu oni ne povas prave pensi, ke tiam nia movado antaŭenirus grandpaŝe? Mi kredas, ke se Lenin estus esperantisto, nun la tuta klerularo el Sovetio, la tuta komunistaro en la mondo parolus esperante. Kaj kiu kontraŭdiros, se mi asertos, ke tiam la unueco de penso k agado, la unueco de volo estus multe pli fortaj ol fakte ili estas nuntempe en proletaj vicoj?

Necesas forte konvinkiĝi, ke la esperanta afero ne estas io akcesora, al kiu sufiĉas dediĉi kelkajn horojn de tempo al tempo por esti konscia mondlingvano.

Teknikiloj ja revoluciigas la mondon. Sed ne sufiĉas inventi ilin; ne sufiĉas laŭdadi ilin, necesas plie lertaj teknikistoj por funkciigi ilin bone.

La SAT-anoj fariĝu bonaj teknikistoj! Ili uzadu zorge, ame la lingvan ilon, kiun ili akiris; ili lertiĝadu, neniam forgesante, ke ilia laboro por k peresperanta estas revolucia laboro en la profunda senco de l' vorto.

E. L.

Fervojlaborista esperanto-rondeto Leipzig-Varen

Nia bildo montras la diligentajn lernantojn de fervojista esp. rondeto en ĉirkaŭurbo de Leipzig. La labor-konsilantaro permesis al ĝi uzi ĝian laborĉambron por instrui. Por la studoj devas sufiĉi la mallongaj labor-paŭzoj, ĉar ĉiuj rondetanoj estas tre okupataj kiel funkciuloj en lab. kultur- k sport-movadoj. La lernado estas nur ebla pro granda entuziasmo k fervoro. Dank' al "Petro", "La Lernanto", "S-ulo" ni pliperfektiĝos. Ankaŭ tre helpis al ni la gramatika kurso aperinta en la sindikata fervojista gazeto "Der Deutsche Eisenbahner". Kelkaj inter ni jam SAT-aniĝis k abonis al "S-ulo", per kiu ni trovis kolektivan kaj individuan korespondadon. Por la 9-a SAT-Kongreso ni interrilatas kun nia sindikato por aranĝi eksterordinaran fervojistan kunvenon dum la kongresaj tagoj kaj tiel veki pli grandan intereson ĉe ĉiuj kolegoj. Invitante ĉiujn fervojistojn-kolegojn en SAT-anio al nia 9-a, ni donas al la Kongr. Komitato 6 mk. g. por la kongresa organizado.



Notoj pri nia laborejo: Ĝi estas transŝarĝejo por pakaĵoj, ĉiuspecaj sendaĵoj. Okupataj estas ĉi tie 500 fervojlaboristoj, kiuj dum sia deĵoro penege devas transporti pezajn ŝarĝojn de vagonoj al vagonoj, destinitaj al diversaj lokoj. La labortago estas 9-hora (tag- k nokt-deĵoroj). Dum tiu tempo ĉiu laboristo devas transŝarĝi 7 mil kilogramojn. La meza salajro estas 37 markoj semajne (= ĉ. 9 dolaroj). Ekzistas eblo ricevi iom pli da mono laŭ popeca laboro, sed organizitaj laboristoj tion kontraŭstaras, ĉar ĝi signifas superstreĉon k okazigas akcidentojn k malsanon. La laborpaŭzoj estas tre mallongaj k eĉ apenaŭ sufiĉas por manĝi. La kolegoj loĝas plej grandparte malproksime de la laborejo k devas uzi vagonaron por ĝin atingi.

La laciga laborego apenaŭ permesas okupi sin pri spiritaj okupoj. Tamen, kiel montras niaj citoj, esp-o trovas eniron ĉe la K-doj. E. Rödel (5068).

RADIO-AMATOROJ, ATENTU!

Esperantaj disaŭdigoj en nederlanda lab. radio

nun fine estas aranĝitaj ĉe la VARA. (Unuiĝo de lab. radio-amatoroj). La unua elsendo komenciĝis je dimanĉo, 2. junio, matene de 9-a horo ĝis 9,15-a M. E. T.[1] k poste okazos ĉiun sekvontan dimanĉon je la sama tempo. Ondlongo 1071 m. Stacio: Hilversum. Ni jam petis en la antaŭa n-o helpi al ni en niaj klopodoj sendante sciigojn disaŭdigindajn k raportojn, por taŭge eluzi la helpe de petskribo fine akiritan kvaronhoron ĉiudimanĉon por disaŭdigo.

Parolanto estos nia Prezidanto K-do F. Faulhaber, Amsterdam, Marathonweg 15, II, al kiu oni sendu ĉiujn informojn k sciigindaĵojn. Nepre ankaŭ sendu leterojn pri la aŭskultado k kun peto pri daŭrigo de l' elsendoj al: VARA, Postbus 50, Hilversum (Nederl.).

Nederlanda Federacio de Lab. Esperantistoj.

TRA LA MOVADO

(Kroniko)

GERMANIO. LEA por germanl. regionoj havis 1. 1. 29 staton de 183 grupoj. 174 grupoj (kiuj raportis por la statistiko) havas membrostaton de 3217 personoj, inter ili 389 virinoj k 154 gejunuloj. 357 kursojn por komencantoj partoprenis en komenco 5028 pers., fine de la jaro restis 1781. Instruas en la kursoj 19 instruistoj, 1 instruistino, 413 instruantoj. Uzataj estas preskaŭ nur la LEA-lernolibroj (en kelkaj okazoj "Petro"). El la kursoj okazis 130 en lernejoj, 94 en hejmoj k 103 en gastejoj. El la membroj estis SAT-anoj 1014, "S-ulo"-abonantoj 679, abonantoj al "La N. E." 123. El la membraro de LEA estis sindikate organizitaj 2138, politike, 1142, lab.-sportuloj 909, liberpensuloj (organizitaj) 660, eksiĝintaj el eklezio 1219, abonantoj de lab. taggazeto 1783. En 69 lokoj, kie ekzistas lab. esp. grupoj, ankaŭ estas burĝaj grupoj. 29 grupoj estas subtenataj de aliaj organizoj (sindikatoj ktp.). (Laŭ "Arb.-Esp.") — **NEDERLANDO.** La membro-nombro de la Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj estis: 1. jan. 1928 75 membroj en 5 sekcioj, 31. julio 1928 140 membroj en 7 sekcioj, 31. dec. 1928 164 membroj en 8 sekcioj k 2 ĝeneralaj membroj, 31. marto 1929 218 membroj en 11 sekcioj k 11 ĝeneralaj membroj, 28. aprilo 1929 260 membroj en 13 sekcioj k 10 ĝeneralaj membroj, 26. majo 1929 301 membroj en 15 sekcioj k 11 ĝeneralaj membroj. La kresko ankoraŭ daŭras. Ĝeneralaj membroj estas tiuj, kiuj loĝas en lokoj, kie ne estas sekcio. (W. A.) — **POLIO.** En Zaglembie Dombrovskie okazis 2. junio 1-a distrikta kongreseto en urbo Bendzin kun parolado pri esp. propagando en lernejoj.

[1] 9-a h. M. E. T. (Mezeŭropa Tempo) = 9-a horo Okc. E. S. T. (Okcident-eŭropa somera tempo) = 10-a horo Or. E. T. (Orient-eŭropa tempo) = 9.20-a h. A. S. T. (Amsterdama somera tempo). Ĝi lasta estas la tempo en Nederlando dum somero.

PAROLAS KIEV...

La 2. septembro 1927 unuafoje estis disaŭdigata esp. programo de la Kieva radio-sendstacio. K-do Viktorov-Ĉeĥoviĉ (5627) raportis pri 40-a datreveno de esp-o; oni alvokis al ĉiuj esp. radiistoj kaj finis per kroniko pri la esp. movado. Kiel rezulto de tiu unua elpaŝo sekvis perradia esp. kurso, disaŭdigita de K-do Fedotov (728) laŭ Rublov. Poste la Radiofako ĉe l' Kulturkomitato de Intersindikata Konsilantaro komencis disaŭdigi ĉiusemajnajn informojn. Fine ekvivis (19. nov. 1928) "Esp. Radio-Bulteno". La disaŭdigoj okazis ĉiulunde de 18-a ĝis 18.30-a h. laŭ Moskva tempo. En la "Bulteno" oni prezentis mallongajn artikolojn pri historio kaj praktiko de l' esp-a movado. Oni legis ricevitajn leterojn el eksterlando. La "Bulteno" informis siajn aŭskultantojn pri "S-ulo", "La Nova Epoko", "Intern. Lingvo" (rusa) ktp. Ankaŭ esp. kronikon ni komunikadis. Tiele vastaj tavoloj de radio-aŭskultantoj estis informataj pri esp-o. Multaj el ili sin turnis per demandoj al la redakcio. Tre ofte tiom abundis la materialo, ke ni devis peti plilongigon de nia disaŭdig-tempo je 10 ĝis 15 minutoj. Multajn aprobajn leterojn ni ricevis. En specialaj sovetiaj festotagoj, ni ĉiam prezentis al niaj aŭskultantoj konformajn artikolojn kaj legis beletristikajn fragmentojn.

Multe nin helpis en tio la leteroj de niaj esp. korespondantoj el Germanio, Francio, Svedio, Ameriko, Japanio. Ni tre petas ĉiujn K-dojn, kiuj disaŭdigas esp-e interŝanĝi kun ni la spertojn de sia laboro.

Nuntempe ni disaŭdigas "Esp. Bultenon" ĉiumarde je 18-a—18.30-a h. laŭ Moskva tempo, ondlongo 899, 1 m. Skribu al ni laŭ adreso: USSR, Kiev, Palaco de Laboro, str. Korolenko 33, komn. 125, red. "Esperanto-Bulteno".

SAT-anoj 5627, 4544.

K-DO ROMANO FRENKEL JUBILEAS

Nia SAT-K-do Romano Frenkel (7692) estas unu el la plej unuaj esp. poetoj. Li festas hodiaŭ duoblan jubileon: 55 jarojn de sia naskiĝo kaj 25 jarojn da literatura agado.

Li naskiĝis en vilaĝo Parĥomovka, Ĥarkova gubernio (Ukrainio), en 1874. Lia patro estis inĝeniero-ĥemiisto. Post vizito al gimnazio li studentiĝis ĉe la Kieva universitato en naturscienca fako de fizik-matematika fakultato. Li finis la studadon en 1898. Dum sia 25-jara literatura agado K-do Frenkel verkis multajn originalajn esp. versojn kaj ankaŭ tradukis el rusaj klasikaj poetoj — el Puŝkin, Lermontov, Gogol, A. Tolstoj, Jerŝov k. a. Ĝis nun li senlace laboras por esp-o.

Ni deziru multajn jarojn da plensukcesa laboro al nia jubileanto!

Viktorov-Ĉehoviĉ (5627), B. Egers (4544).

SAT-anoj

En viaj korespondaĵoj al la Administrejo ĉiam citu vian membro-numeron

(14 200.) — **SOVETIO. Ivanovo-Voznesensk.** 1. majo malgraŭ pluva vetero okazis granda manifestacio. Esp-istoj marŝis sub aparta standardo k kantis en esp-o. Laboris dum tiu jaro 25 kursoj (el kiuj ankoraŭ funkcias 10). (3409.) — **SVEDIO. Malmö.** La lab. esp. klubo en Malmö partoprenis en unua maja strata manifestacio kunportante standardon kun surskribo "For la lingvajn barojn. Antaŭen por esp-o", kiu propagandcele bone efikis. Ankaŭ esp. kantoj estis kantataj dumvoje. Oni vendis multajn lernolibrojn en popola parko, kie finiĝis la manifestacio. Partoprenis ankaŭ germ. K-do Schwartz, kiu restis semajnon en M. Li gvidis ĉiuvespere rapidkurson laŭ rekta metodo ĉe ABF-hejmo. 2-a majo li faris publikan paroladon pri esp-o. Trad. E. Andersson. Antaŭ k post la parolado kluba orkestro prezentis muzikaĵojn. (E. A.)

Ĉe la neŭtraluloj

En la japana parlamento (Malsupra k Supra Domo) estis akceptataj du peticioj pri esp-o: 1. ke esp-o estu enkondukata oficiale en la elementaj k mezaj lernejoj; 2. ke Japana Esp. Instituto estu subvenciata de la registaro.

En la poŝtoficejo de Nagasaki (Japanio) okazas oficiala kurso, kiun partoprenas 120 oficejanoj. Ili lernas ĉiutage unu horon.

La 3. pollanda kongreso de esp-o okazos 29.—30. junio en Poznan, dum la tempo de la tiea granda ekspozicio.

KAPTU LA TROMPISTON!

El Reinowitz ap. Gablonz venis sciigo, ke meblisto Christian Eckstrøm vizitante tiun lokon faris trompon, prunteprenante monon ĉe samfakulo-esperantisto helpe de sia esperantisteco. Poste mi pere de la Norvega Meblista Asocio ricevis sciigon, ke la sama persono faris saman trompon en Wien. Per membrokarto li "pruvas" esti membro de la Norvega Meblista Asocio k asertas ankaŭ, ke li estis membro de esperant-societo en Oslo.

Esplorinte la aferon mi povas sciigi, ke 1. la Norvega Meblista Asocio, la Norvega Konstrulaborista Asocio k la Societo de Esp. Laboristoj en Oslo neniam havis membron kun tiu nomo. 2. Lia aserto, ke li restante en Oslo loĝis en la strato Skolegaten 27, estas mensogo, ĉar tiu strato ne havas pli altan numeron ol 14.

K-doj, atentu pri la afero k sciigu en la koncernaj rondoj por eviti pluajn trompojn de tiu persono.

SAT-peranto en Oslo (6971).

AL SOCIALISTAJ GEK-DOJ DE L'AMSTERDAMA INTERNACIO!

Karaj Gek-doj! Por akceptigi k utiligi esp-on al nia Internacio, komuna agado estas nepre necesa. Ĉi-cele ni havu peranton en ĉiu loko, en kiu ekzistas K-doj aŭ eĉ nur unu K-do. Ni esperas atingi, ke la adresoj de nia perantaro povos aperi en la Jarlibro de SAT. Tial bonvolu elekti peranton ĉiuloke, kie ekzistas esp. K-doj. Izoluloj estas petataj akcepti oficon de peranto por sia loko. La adresojn sendu tre baldaŭ al K-do Paul Köckeritz, Tharandter Str. 6, Dresden-A. 28, kiu estas preta kompili la adresaron por la Jarlibro. Aldonu la SAT-matrikulon k atestilon pri via aneco al organizo de la II-a Internacio. (Koncernas nur al regionoj, kie tio estas ebla.) Konrad Deubler (30).



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Eŭgeno Miĥalski, "Prologo". Eld. SAT, Eldona Fako Kooperativa, Leipzig, Colmstr. 1. 64 pĝ. Formato 11×14½ cm. Prezo 0.70 mk. g. Kun titolbildo k bildo de l' aŭtoro.

Ludoj kun vortoj, eĉ vortludoj. Miĥalski fantazias, en versoj riĉenhavaj, belritmaj, ofte tre originalaj. Pruvo ankoraŭ, kiom esp-o taŭgas por poezia lingvo, permesas al poeto krei sian lingvon en ĝi, kiel ĉiuj vivaj lingvoj.

Amo, tre natur-amike prezentata, filozofietaĵoj, jen la eternaj temoj en tiu libreto traktitaj. Precipe regas vortebrio, kaj tiu norda, nigr-arbara senkvieto antaŭ "is, as, os", tempo, spaco, "nefinito", kiu skuas tiom rusojn, germanojn, dum mediteraneanoj komforte loĝas en ĝardene aranĝita dubo pri ĉio tio, la sama dubo de post Cicero, kiu konkludis proksimume (en "De Senectute"):

"Kaj se ni havos eternan vivon en Paradizo, do bone, ni ne timu.
Sed se ni mortos kun korpo? Same, estas tute egale. Ni ne timu."

Miĥalski iom tro ripetas temojn, kliŝojn, kiel "la poeta koro", "eterna amproblemo", "la astro de l' tago", iom tro "trilas". Provu taksi "El la intimprofunda kora en"', kiom profunda, trifoje pli ol "tutkore", tiu verso estas! Inter am-versoj, kial ankoraŭ la tro klasikaj (kvankam romantikaj) ekkrioj: "Montoj, abismar' senfunda; 'de ĉielo blu' profunda"...? Tiaj kliŝoj ne plu taŭgas, post 19-jarcentaj operaĉoj de Verdi, Rosini, Mejerber.

Per esp-o mi nun studas slavan animon. Sensurprize mi retrovas ĉe Miĥalski la saman haŭtvoluptemon, kvazaŭ virino estus animaleto senparola, kiu regas en "Kazanova" de nia K-do Nekrasov[1], kiun en ĉiaj literaturoj, sed precipe en la rusa, oni trovas pentrata.

Jes ni devas lukti kontraŭ tiu "malbeno de amo", kiun kristanismo k hebreismo finsukcesis verŝi en niajn vejnojn, per nenormalaj, abomenindaj monaĥoj k pastroj. Ni devas renaturiĝi. Sed penso, inteligento, seks-amo amikeca, estas ankaŭ naturaj instinktoj, precipe ĉe homo k hundo. Glorante nur haŭtinstinkton, ni ne-bele respondas al stultaj kontraŭnaturaj kristan-moroj per stultaj brutarmoroj, per ridinda blasfem-ŝato. Tiel same, kiam gepatroj ne permesas ludi (tiaj gepatroj estas malpravaj), nervajn infanojn... se ĉi tiuj sukcesas forkuri, ili sin tute kot-superverŝas, por triumfe malobei. Kiom infanaĉe!

Lasta riproĉo: tro da individuemo, tro da mi, kvankam en tiu "prologo" Miĥalski ĵetas belajn versojn eksprimantajn kuriozon, fidon al scienco, — nobla sento, kiun Sovetio nun mirinde profundigas k disvastigas. Tiu sciencemo beligos, karakterizos nian 20-an jarcenton.

Sed Miĥalski precipe, tro individueme, ripetas la romantikajn temojn: "Kiom sola mi poeto inter profanoj". Tion poetoj tute ne rajtas plendi. Se profanoj ilin ĉirkaŭas, ili mem kulpas pri tio. Estas, ĉar ili ne sufiĉe forte k bele poeziumis k vivis. Poeto estas edukisto, kvankam ne lerneja. Kiom valoras la poeto, tiom valoras lia medio k tuta homaro. Sed kiujn superecojn vi praktikas, K-do Miĥalski.

Haŭtvolupton, revadon ĉirkaŭ via mi, kiun vi prezentas en amo nur konanta, nur serĉanta seksplezurojn. Simpla homo kun volupto k samtempe volupta edzino, kun infanoj, vin povus instrui pri vere viva poezio, tiom, kiom vi povas instrui lin pri formo. Vi nur aŭskultu lin, eĉ se li ne tute literature parolas.

Belegaj versoj k ritmoj ensorĉos vin, legantoj; libera seks-entuziasmo sane vin vekos. Mi tamen ne volis eviti montron de la laŭ mi troigaj, ekscesaj ŝatoj de nia tre talenta K-do Miĥalski, vigla kiel forto de naturo, sed krome. tre literatura.

Nur "prologo" estas tiu libreto, laŭ la aŭtoro mem. Do, ni esperu, k jam ebriiĝu kun li (ebrio sen veneno, spirita ebrio), legante tiun libron, unu el la plej belsonaj esp-aj poemaroj. Jief.

[1] K-do Jief legis la manuskripton (versaĵaron) kun tiu titolo de K-do N. Temas ankaŭ pri esp. originalo. — Red.

Ŝ. Goldfeder, Internacia Lingvo Esperanto. Esp.-rusa vortareto, ruso-esp-a vortareto k kompleta esp. gramatiko. Eld. Distr. Komitato SEU, Barnaul, Siberio. 80 pĝ. Prezo 15 kop.

Libreto en formato de la konataj "ŝlosiloj", sed kun grandlitera preso, kiu strangete efikas kontraste al tia malgranda formato. Manko de supersignoj ne estas oportuna, precipe ne ĉe libroj destinitaj por komencantoj. La neoficiala "oz" estas senkomente metita inter la sufiksaro, dum "end" pli ofte uzata ne estas montrita. Malgraŭ sia modesta amplekso la libreto povas, same kiel la "ŝlosiloj", ludi rolon de instigilo k varbilo. N. B.

Poezioj de L. Zamenhof, skribitaj en esp-a stenografio Duployé - Flageul. Prezo 1.50 fr. (1 respondkupono). Eld. de Esp-a Stenografio, 9, Bould. Voltaire, Issy-les-Moulineaux, Seine, Francio. 16 pĝ. Form. 11×16 cm.

La malgranda broŝuro enhavas kelkajn konatajn versaĵojn de Zamenhof aperintajn en "Fundamenta Krestomatio", en transskribo al franc-esperanta stenografi-sistemo publikigita de l' eldonanto, s-o Flageul. Ĉi lasta promesas al ĉiu mendanto de tiu broŝuro senpagan sendon de lernolibro pri sia stenografio.

Raporto de la Aerologia Observatorio de Tateno (Japanio). N-o 3. Eldono de

la citita Observatorio, Tateno apud Tutiura (Ibaraki-ken), Jap. 154 pĝ. Form. 22×30 cm. Prezo nemontrita. Jam la trian fojon tiu scienca observejo en Japanio eldonas sian raporton pri faritaj observoj en esp. lingvo. Trafa apliko de nia lingvo, samtempe plej bona propagando por ĝi!

Universala Federacio de Pedagogiaj Asocioj. III-a dujara Kongreso, Ĝenevo, 25. julio ĝis 4. aŭgusto 1929, sub la patronado de l' Svisa Federala Konsilantaro. 6-paĝa prospekto en esp-o.

MEMORNOTO

Represis el "S-ulo":

Le Travailleur, Troyes, 4. 5., Rusa ŝiparo (237), Tago de lab. gazetaro (238); Bla Blandet, Örebro, 25. 4., Alkoholmalpermeso en Usono (230), trad. E. Eriksson; Majbutjnja Zmina, Dnepropetrovsk, 30. 3., unua art. de Hisano Mijake pri Japanio.

Priesper. artik. k notojn enhavis:

Signalen, Stokh., 9. 5.; Heraldo de Madrid, 9. 5.; Instruista gazeto, Moskvo, 20. 2.

Peresper. materialon enpresis:

Majbutjnja Zmina, Dnepropetr., 30. 3.; Travail, Lyon, 11. 5.; Strada (kampar. gaz.), Perm, 28. 4.; Svesda, Perm, 1. 5., 4. 5.; Krasnaja Iskra, Boroviĉi, 25. 3.

NIA POŜTO

9425. — Vi sendube konsentas, ke la hindoj, araboj k. a. batalu por akiri nacian sendependecon; sekve kial vi ne volas konsenti la samon al la judoj? En via artikolo estas atakoj kontraŭ partiaj gvidantoj k pro tio ni ne povas enmeti. Vi eraras, dirante, ke la legantoj de "S-ulo" nenion scias pri cionismo; jam aperis artikoloj pri la temo en la n-oj 13, 50, 189, 190 k. a. E. L.

10 405. — Ni ne povas enmeti vian longegan artikolon pri propono, kiu ŝajnas al ni tute fantazia. Faru konkretan proponon al la Kongreso k ni ĝin publikigos. E. L.

10 099. — La kaŭzo, pro kiu revenis al vi la letero kun via manuskripto, estas tiu, ke vi malsufiĉe afrankis k ni ne plu akceptas ŝarĝi la kason de SAT per pago de pun-afranko al la poŝto. Verku pli faktece k koncize!

N. Barmin. — Ni jam posedas abundan materialon pri la temo, sekve ni ne povas enmeti vian artikolon. Vi devus sendi ĉu poŝtkarton kun afrankita resp., ĉu respondkuponon, se vi volas ricevi privatan respondon.

9634. — Jam aperis en n-o *242* artik. pri la sama fakto; sekve ni ne povas enmeti vian. Red.

11 424. — Pakaĵo de kovertoj kaj il. pk. revenis. Verŝajne vi devis pagi imposton kaj rifuzis la sendaĵon.

KOREKTO

Pro teknika eraro mankas en n-o *243* pĝ. *342* sub la raporto de l' ALLE-Plenkunveno la subskribo de la verkinto de l' raporto: D-ro Grimme, kiun oni aldonu.

K * O * R * E * S * P * O * N * D * A * D * O

Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. g., ĉiu plia linio la samon. Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.
L = letero, PK = poŝtkarto, PI = poŝtkartoj ilustritaj, PM = poŝtmarkoj, bfl. = poŝtmarko sur bildflanko, kĉl. = kun ĉiuj landoj, esp-aĵo = esperantaĵo.
Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

GERMANIO

K-do Willi Giese, Heimdall, Bad Elster i. V., dez. koresp. pri ĉ. temoj kĉl., L, PI, bfl. Ankaŭ kun K-dinoj.

K-do Walter Zeitner, Rostocker Str. 6, Berlin NW 87, ĉe Grahlmann, dez. koresp. kĉl. komencantoj.

K-do B. Antwerpen, Zitadellstr. 12, Düsseldorf, dez. koresp. kĉl., precipe kun ekstrema Oriento.

K-dino I. Becker, Binterimstr. 3, Düsseldorf, kore dankas por la multaj resp., sed ne estas kapabla resp. al ĉiuj. Estu kompatemaj!

K-do P. Conzelmann, Tailfingen (Württemberg), dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temon, precipe pri muziko, literaturo, politiko, ekonomio. Resp. garantiata.

SOVETIO

— 3 gejunuloj - sovetoficistoj deziras koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L, PK, PI, gaz. Nepre resp. Aparte kooperativanoj skribu abunde pri koop. Adr.: K-do I. Matveenko, Ĉapajevskaja, 71, III, Samara.

K-dino T. Zakotnova, Krasnaja, 32, Slavjanskaja, Kub. okr., dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj, L, PK, PI.

K-do V. Voroncov (20 j. fotoamatoro), Tagaiskaja, 31, kv. 4, Moskvo-4, dez. koresp. kĉl. pri div. temoj, L, PK, PI, fotoj.

— Grupo de tramistoj dez. koresp. kĉl. pri profesiaj demandoj k vivo de lab-istaro. Adr.: Klubo de Buĥarin, Taganskaja, 56, Moskvo-4.

— Juna laboristo de ŝipkonstruejo dez. koresp. individue aŭ kolektive kun junlab-istoj el ĉl. Adr.: K-do Prigodov, Labesko, "Jaĉejka Morzavoda", Str. de Frunze, 30, Sebastopolo, Krimeo.

K-do N. Pavlov (oficisto), "Okrono", Barnaul, Siberio, dez. koresp. kĉl. pri polit. lab. k rev. temoj, L, PK, gaz., ĵurn., fotoj. Resp. garantiata.

K-do Gubij, ul. Sverdlova, 55, Odessa, dez. koresp. kun seruristoj fervojistoj, pneŭmomartelistoj k fiŝkaptistoj el ĉl., kolektive k individue. Resp. garantiata.

K-do Molokov - Ĵurski (edukisto), Pedag. Teknikumo, Kremenĉug, dez. koresp. kĉl. pri natursciencoj (precipe botaniko, biologio).

100 edukistoj

volas kolektive korespondi kun vi!
Aliĝu al edukista labor-rondo
TEPS sendante *ĉiumonate* artikolon pri vialanda *lernejo* k *instruistaro*. Vi ricev. *ĉiumonate* **senpage** 12—16-paĝan *informilon* (TEPS-leteraron), 4—8-paĝan gazeton *"Vojo de Klerigo"*. Sendu tuj artikolon al:
Marcel Boubou, 96, rue Saint-Marceau **Orléans (Loiret), Francio.**

K-do V. Belogorcev (26 j. maŝinisto), Zavod A. Marti: Esperanto, Nikolaev, Ukrainio, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj. Resp. garantiata.

K-do B. Veksler (19 j. elektristo), Rybnaja, 29, Nikolaev, Ukrainio, dez. koresp. kĉl. pri lab. vivo industrio k. a. temoj. Resp. garantiata.

Adresŝanĝo. — K-do Gregoro Jefremov (SAT-ano 6359), Srednevolĵskoj oblasti, Kontora okruga svjazi, Kuzneck (antaŭe en Samara), dez. koresp. kĉl. pri politika, lab. vivo, laboro, aparte kun poŝt-, telegraf-, telefon-istoj.

K-do B. Ĵeleznjakov (SAT-ano 5583), Raboĉaja, 39, kv. 1, Samara, dez. koresp. kĉl. pri ŝparkasoj-istoj (por sia laborejo), ankaŭ porgazetan korespadon pri demandoj laŭ interkonsento. — Ĉiu almenaŭ sciigu adresojn de uzantaj esp. proletgaz. k ilian partitendencon, legantaron.

K-dino Antonino Kobenina (22 j. artvizaĝistino), str. de Leo Tolstoj, 77, III, Samara, dez. koresp. kĉl. pri ĉ. temoj.

SVEDIO

K-do A. Soares (6727), informas ĉiujn siajn gekoresp-antojn pri nova adreso: K-do A. Soares ĉe Gustavson, Ekeberga, Säveldalen.

ATENTU!

Komence de julio okazos en Lyon grandaj kongresoj de fabrikoj (metalaj, kemiaj, teksaj ktp.). Sendu leterojn, afiŝojn, gazetojn ktp. al adreso: **Union régionale des syndicats 5/7, passage Coste, 5 cours Lafayette-Lyon 6.**

ENHAVO:

	paĝo
La brita ministo kaj lia mondo	357—58
La interna stato de Bulgario	358
Pri Nederlando	358
La fiasko de kolonio	359
Franca Sudano	359—60
Nova politika revuo	360—61
La anglaj elektoj kaj la virinoj	360—62
Pli science ol la scienculoj	361
El kvindekjara vivo en sovaĝejo	361—62
Faktoj sen komentoj	362
Sennaciula Liberpensula Paĝo	363
Tra Esperantio	364—68
Korespondado, Anoncoj	368

Presejo: Peuvag. Druckerei-Filiale Leipzig (Germanio)